

revuo

esperanto

junio 1964

57-a jaro

n-ro 703 (6)

universala esperanto - asocio (en konsultaj rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)



ESPERANTO

revuo internacia

- enhavo**
- 101** Forpaso de Prof. Hideo Yagi
 - 102** Lingvoj en Afriko (Tonkin)
 - 106** Nova granda agado de UEA (Lapenna)
 - 107** Lerneja Bulteno N-ro 2:
Unesko-projekto "Asociiĝintaj Lernejoj"
Listo de rekomenditaj lernolibroj k.a.
 - 110** Montevideo, centro de sciencaj esploroj
 - 112** "La emoj" (Baudelaire/Lobut)
 - 113** Leteroj:
Fruaj tradukoj el Shakespeare (Auld)
Pri tradukmaŝinoj (Hanhiniemi)
 - 114** Novaj libroj
 - 115** Ricevitaj eldonaĵoj
Premio Comella-Bassols
Nekrologoj
 - 116** Mallongaj novaĵoj
 - 117** Memoriga kalendaro
Citaĵoj
Esperanto en radio
Poŝtmarkkolektado
49-a UK, Hago, 1964
 - 118** La Juna Vivo
20-a IJK de TEJO, Amsterdam, 1964
 - 119** Oficiala informilo n-ro 369
 - 120** La internaciaj konkursoj

kovrilo Prof. D-ro Hideo Yagi, 1899-1964

fotoj **105** Fotis Tibor Sekelj

**oficiala organo
de universala
esperanto-asocio**

(En Konsultaj Rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)

esperanto
junio
1964

Fondinto: H. Hodler

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Cion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, manuskriptoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Telefono: (010) 3 27 88. Ĝirkonto 378964.

TELEGRAMADRESO:
ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) **antaŭ** la 1-a de la antaŭa monato.

Manuskriptoj por "Esperanto" estu tajpitaj en 2 ekzempleroj sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj tre larĝa margeno.

Bankisto de U.E.A.:

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Nieuwe Binnenweg 460-462, Rotterdam-6, Tel. (010) 5 66 45.

Traduko kaj represo de artikoloj, kun escepto de verkoj premiitaj en konkursoj, estas permesitaj, kondiĉe ke oni menciu la fonton.

Jara abono (1964): 15,— gld. (kun membreco kaj jarlibro 20,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj: ricevebla laŭ peto.

Anoncetoj pri korespondado:

0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en 84 landoj.

Estraro de U.E.A.:

H. W. Holmes O.B.E., vic-prezidanto, kaj aganta prezidanto, 38 Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

E. L. M. Wensing, vic-prezidanto, Aalsterweg 217, Eindhoven, Nederlando.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario kaj estrarano pri kongresoj, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

D-ro André Albault, estrarano pri kulturaj aferoj, 8 Avenue Etienne Billières, Toulouse, Francujo.

S-ro Z. Czuba, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Odýnca 73/100, Warszawa, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

S-ro Sv. Ziegler, helpa sekretario kaj estrarano pri informado, Kystvej 10, 2 th., Aabenraa, Danlando.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: ARNold 90-81.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, Zürich 6/57, Svislando.

Forpaso de Profesoro Hideo Yagi

nekrologo

En la mateno de la 6-a de majo alvenis telegrame la dolora informo, ke Prof. D-ro Hideo Yagi, kiu ĝis antaŭnelonge estis la Prezidanto de UEA mortis en tiu sama tago. Jam de kelka tempo lia sanstato estis maltrankviliga, kaj estis pro tiu stato, ke li devis kontraŭvole demisii el sia Prezidenteco tuj antaŭ la Estrara Kunsido en marto. Al la Estraro, kiu havis la privilegion intime kunlabori kun Prof. Yagi jam plurajn jarojn, lia malapero estas profunde malĝojiga, kaj estas ekster dubo, ke tiun malĝojon kunsentas unuavice la japana movado kaj ankaŭ la tuta membraro de UEA, kiu povis en diversaj Universalaj Kongresoj kaj per liaj karakterizaj artikoloj ekkoni lian simpatian personecon. Certe la tuta Asocio aliĝas al niaj elkoraj kondolencoj al liaj edzino, familio kaj parencoj, kaj al la japanaj Esperantistoj, kiuj perdis tiel valoran kunlaboranton.

Por ĉiuj, kiuj povis en kongresoj, en la Komitato aŭ Estraro, de proksime kontakti kun li, restos neforgeseblaj lia ĉiama ĝentileco kaj lia trankvila insisto pri harmonia interhelpo kaj pozitiva kunlaboro: kiel li skribis antaŭ nur kelkaj fatalaj monatoj: "En laboro Esperanta ni ne forgesu amikecon al kunlaborantoj, sed ĉiam havu fratecon kaj estimon!"

Hideo Yagi naskiĝis proksime de Osaka la 18-an de aŭgusto 1899. Li eksciis pri la Internacia Lingvo kiel lernanto en liceo jam en 1914, sed serioze ekstudis la lingvon nur tri jarojn pli poste, per lernolibro de J.C. O'Connor. Aliĝinte en 1918 al la tiama JEA (Japana Esperanta Asocio) li post ne longe fondis Esperanto-Klubon "Sanko" en la Tria Nacia Kolegio en Kioto, kaj fondis kaj dum kelka tempo redaktadis ĝian ilustritan organon "Libero". En Kioto, urbo multe vizitata de eksterlandaj turistoj, prezentiĝis oftaj okazoj por renkontiĝi kun alilandaj Esperantistoj, kio rapide firmigis lian konvinkon, ke la Internacia Lingvo estas io, por kio plene valoras labori. Kun tia kredo, li fariĝis membro-abonanto de UEA en la jaro 1920, kaj en 1922 ekfunkciis kiel ĝia Delegito en Kioto, kie li studis en la Ŝtata Universitato. Ĉirkaŭ tiu tempo aperis lia Japana- Esperanta Vortaro, en kunlaboro kun S-roj I. Sakurada kaj Y. Okamoto, kaj lia "Kurslibro de Esperanto". Poste li publikigis japanlingvan broŝuron "Pri la problemo de fremdlingvoj kaj Esperanto en Japanujo". Jam antaŭ ol li finis siajn medicinajn studojn en 1925, li komencis apliki la Internacian Lingvon ankaŭ por fakaj celoj, kaj povis publikigi diversajn medicinajn artikolojn en Esperanto ne nur en Esperanto-revuoj sed pli poste ankaŭ en naciaj medicinaj periodaĵoj.

Paralele kun sia grava laboro en la japana Esperanto-movado, Hideo Yagi grandapase antaŭenigis sian profesion karieron, agante kiel asistanto kaj pli poste kiel vicprofesoro

en la ginekologia kliniko de la sama universitato, kie li kompletigis siajn studojn: la Ŝtata Universitato de Kioto. En 1934, ĉirkaŭ 35-jara, li akceptis inviton el Okayama, fariĝi Profesoro de Ginekologio kaj Akuŝologio en la Medicina Fakultato de Okayama Universitato. En tiu ofico li establis sin kiel alte respektata spertulo pri la elektita kampo de medicino.


En Okayama Profesoro Yagi same funkciis kiel Delegito de UEA, kaj li krome kaptis la okazojn de profesiaj vojaĝoj, kiujn al li de tiam prezentis lia pozicio, por viziti Universalajn Kongresojn de Esperanto. Kiel la unuan li partoprenis la 29-an UK en Varsovio en 1937.

La postmilita periodo alportis por li novajn grandajn honorojn kaj gravajn funkciojn en diversaj Esperanto-organizaĵoj. Ekde 1953 li laboris kiel Ĉefdelegito de UEA por la japana teritorio, kaj tion daŭrigis ĝis la aliaj oficoj en la movado fariĝis tro pezaj. Denove en 1954 li povis ĉeesti Universalan Kongreson — en Haarlem — kie li prelegis en la Internacia Somera Universitato. En postaj jaroj li faris ankoraŭ tri aliajn prelegojn en ISU, kiuj ĉiam allogis grandan aŭdantaron. Same en 1954, li reprezentis la Japanan Societon de Ginekologio kaj Akuŝologio en la 5-a Internacia Kongreso de tiuj fakoj en Genevo. Sekvis elstara periodo, dum kiu li estis elektita estrarano de la Internacia Federacio de Ginekologio kaj Akuŝologio (1956), kaj poste ties Vicprezidanto (1961). Intertempe li fariĝis Prezidanto de la Azia Ginekologia Asocio, kun sidejo en Tokio. En 1959 li fariĝis samtempe Prezidanto de la Unesko-Asocio de Okayama, Prezidanto de la Universala Medicina Esperanto-Asocio (tiama TEKA), Rektoro de la Universitato de Okayama, kaj eniris la Estraron de UEA kiel ĝia Vicprezidanto.

Kiel la unua azia Prezidanto de UEA ekde 1962 (Kopenhago), li sendube konsciis sian gravan rolon en la universaligo de la movado. Por la rilatoj kun la neesperantista publiko, kiel montris la Universalaj Kongresoj en Harrogate kaj Sofio, kiujn li prezidis, liaj eminentaj kvalifikoj kaj la simpla fakto, ke li estis aziano, havis grandegan valoron.

Fariĝinte en 1962 emerita profesoro de la Okayama Universitato, li direktis ĝis sia malsaniĝo la Kancer- Instituton Kawasaki en la sama urbo. Ankoraŭ ĉiam li konservis viglan interesigon por la aplikado de la Internacia Lingvo en la scienco, kaj en la lastaj jaroj fondis specialan premion por la plej bona esperantlingva scienca aŭ medicina traktaĵo en Japanujo.

Estis kompreneble, ke li, partopreninto aktiva de pluraj Universalaj Kongresoj, fariĝu Prezidanto de la Loka Kongresa Komitato por la 50-a UK en Tokio tuj je ĝia formiĝo. Des pli bedaŭrinde, ke li, kiu tiel entuziasme pledis por tiu una Universalaj Kongreso sur azia teritorio, ne ĝisvivis ĝian realigon.



Tiel aspektas hodiaŭ la limoj inter la ŝtatoj de Afriko: limoj plejparte hereditaj de koloniaj registaroj. Malofte ili koincidas kun lingvaj aŭ rasaj dividoj. Por povi alporti utilan helpon al Afriko, la Esperantistoj de aliaj kontinentoj devas unue konatiĝi kun la faktoj de la afrika lingva problemo, anstataŭ rigardi ĝin el sia propra vidpunkto.

Lastatempe okazis en la Esperanto-movado evidenta kaj tre saltinda kresko de intereso pri Afriko, kaj speciale pri ties lingvaj problemoj. Aperis pasintjare artikolo de tri spertuloj pri Afriko en la revuo *Esperanto*; UEA eldonis specialan broŝuron en la angla araba kaj franca lingvoj, kiu priaktas la afrikan lingvan problemon; la gazeto *Pola Esperantisto* aperigis plurajn interesoplenajn artikolojn pri Afriko en siaj lastaj numeroj, kaj (eble la plej grava evento ĉiuj) fondiĝis en Pollando la Centro de Esploro pri Afriko.¹

CEA estas fako de Pola Esperanto-Junularo, la pola TJO-sekcio. Ĝi prizorgas studentajn spertulojn pri Afriko kaj ĝi aperigas siajn raportojn kaj studojn ĉefe en la bulteno de PEJ, *Tamen*.²

El Afriko mem, kompreneble, regule atingas la Esperanto-publikon novaĵoj pri loka agado en tiu aŭ alia lando, kaj ja dumlonge multidaj esperantistoj interesiĝis pri la enkonduko de la lingvo en Afrikon kaj laboris por tiu celo. Ankaŭ jam ekzistas landa asocio kaj TJO-sekcio en Madagaskaro, kaj lastatempe vizitis la kontinenton la Karavano de mikeco, sub la gvido de Tibor Sekelj.

Sed ĉu la esperantistaro entute scias kion ĝi volas atingi en Afriko? Ĉu ĝi eĉ adekvate komprenas la homan psikon, aŭ konscias pri la sociologiaj faktoj por komenci formuli planon de agado direktitan al klare difinita celo? Ŝajnas al mi ke ne. Ni ankoraŭ nur tuŝetis la problemojn, kaj ĝenerale ekzistas plena nescio pri la malfacilaĵoj.

Plejparte naciaj lingvoj ne ekzistas

Estas bedaŭrinde ke libro kiel *Languages in Africa* ne povis aperi en Esperanto. Ĝi estas kolekto de prelegotekstoj kaj konkludoj de konferenco kiu okazis en Ibadan (Nigerio) en januaro 1962. Ĉeestis la konferencon trideko da profesoroj el universitatoj en ĉiuj partoj de tropika Afriko. Iliaj prelegoj estas modestaj, tre diversigitaj kaj (kutime) realismaj taksoj de la afrika lingva situacio, kaj ili efike helpus forblovi kelkajn nubojn el la kapo de la meza esperantisto.

Kutime, tiu meza esperantisto, imagas ke la enkonduko de Esperanto en tiun aŭ alian afrikan ŝtaton similas la enkondukon de Esperanto en eŭropan ŝtaton. "Ĉiu homo parolu sian nacian lingvon kaj Esperanton" li naivete diras, laŭ la kutima slogano. Sed,

Ci tiu artikolo estas bazita sur la verko:
LANGUAGE IN AFRICA: papers of the
Leverhulme Conference on Universities and
the Language Problems of Tropical Africa.
red. John Spencer. 167p. Cambridge University
Press, Cambridge, Britujo. 1963. prezo: £ 1-1-0.

kompreneble, plejparte naciaj lingvoj ne ekzistas en Afriko. En okazoj kie lingvoj estas multe disvastigitaj, la parolantoj de tiu aŭ alia lingvo tre malofte formas majoritaton en unu lando, kaj tre ofte trovas sin en du aŭ tri diversaj landoj: la distribuo de la lingvoj tute ne kongruas kun la landlimoj.

Kaj fakte, multe disvastigitaj lingvoj tre maloftas. Ekzistas kelkaj t.n. *vehicular languages* (interlingvoj), kiel la ŝuahila (en la oriento), haŭsa (en la okcidento), eŭonda (Kameruno) kaj lingala (Kongolando), kiuj disvastiĝis ĉefe pro komercado inter diversaj regionoj. Kvankam oni scias pli-malpli precize, kiom da homoj parolas denaske tiujn lingvojn, oni ĝis nun faris tre malmultajn studojn pri ilia disvastigiteco kiel duaj lingvoj — io kio evidente urĝas. La plejparto de la afrikaj lingvoj estas multe malpli larĝe parolataj. Pro la esence tribocentrigita socio kiu regis en tropika kaj suda Afriko antaŭ la alveno de la eŭropanoj (kun ties artefaritaj landlimoj kaj sankta misio de "civilizado") disvastiĝo de unu lingvo emas limiĝi al mallarĝa geografia regiono. La najbaraj lingvoj ofte tute ne rilatas ĝin: iliaj vortprovizo kaj gramatiko ofte baziĝas sur tute aliaj strukturonormoj.

Kaj oni ne pensu ke ĉi tiuj lokaj lingvoj estas iusence "primitivaj" aŭ "dialektoj". Kiel diras Robert Armstrong en sia interesoplena prelego "Indiĝenaj lingvoj kaj kulturoj de moderna Afriko" en *Languages in Africa*:

Jam je la tempo de la unua mondmilito, suprizo fakto fariĝis tre evidenta al lingvistoj: malgraŭ multa serĉado, nenie en la mondo oni trovis primitivan lingvon.

Fojon post fojo en ĉi tiu libro oni emfazas la fakton ke la lingvo kiun parolas individua afrikano estas parto de lia heredaĵo kaj parto de lia kulturo (kaj rajtas al respekto pro tio). Se li perdas sian lingvon, li fariĝas homo sen kulturaj rajtoj — "kultura rifuĝinto". Kaj tio estas unu el la ĉefaj evitendaĵoj, laŭ la konkludoj de la konferenco.

Cu la esperantistoj bone komprenas kion signifas konservo de la indiĝenaj lingvoj? Nigerio, ekzemple, ne estas ia Svislando, kun tri aŭ kvar lingvoj: ĝi havas minimume 150. Multaj eĉ ne havas propran ortografion: ili neniam estis skribitaj. Aliaj havas ortogra-

fiojn ellaboritajn kun nesufiĉa sperto, aŭ laŭ netaŭgaj principoj, kiuj ne plu adekvatas — ĉefe ĉar kelkaj lingvoj, sub eŭropaj kaj aliaj influoj, nuntempe rapide ŝanĝiĝas. Kelkfoje eĉ okazas ke afrika lingvo havas pli ol unu ortografion: la konferencaj raportoj mencias unu sudafrican kiu havas kvin, ellaboritajn de misiistoj de diversaj religiaj kaj naciaj fonoj.

Parolante pri afrikaj lingvaj problemoj, ni konsciu ke preskaŭ duono de la lingvoj parolataj en la mondo estas afrikaj. Pli preciza statistiko ol tio nuntempe ne eblas: oni simple ne scias kiom da afrikaj lingvoj estas. La ducento kiun menciis Mark Starr en la artikolo en *Esperanto* ampleksas nur la ĉefajn. Neville Denny, ekzemple, en unu el la plej interesaj kaj por ni gravaj prelegoj en la libro ("Lingvoj kaj Edukado en Afriko") citas kiel ciferon 1000 — kaj klarigas ke ankaŭ li ne precize scias. Tio, parenteze, klare montras la nesciencan imagemon de tiuj multegaj esperantistoj kiuj citas en siaj informiloj certan difinitan nombron de lingvoj en la mondo, kvazaŭ temus pri iu scienca fakto. Tio egale stultas (kaj oftas) kiel diri ke "ekzistas tiom aŭ tiom da esperantistoj en la mondo". Kio estas esperantisto? Kio estas lingvo? Kio nur dialekto? Kiel entute eltrovi kaj nombri ilin?

2896

La cito de preciza nombro de lingvoj en la mondo (unu mirakle aplomba usona informilo pri Esperanto bele donas la precizan ciferon de 2896 — kaj tion prezentas al supozeble kredema publiko) estas do ankoraŭ unu manifestiĝo de la naivismo de la esperantistaro. La "svislanda" vidpunkto estas alia. Ĉe tio, ne nur temas pri la nombro de lingvoj en unu afrika lando, sed pri la stato de la edukaj servoj. En Svislando eblas reciproka lernado de lingvoj inter la lingvogrupoj: homoj vojaĝas, legas, aŭskultas, ricevas spertan instruadon. En Nigerio nur duono de la koncerna aĝgrupo vizitas elementan lernejon; nur tri procentoj vizitas mezlernejon — kaj tiuj ciferoj estas laŭ afrikaj normoj relative altaj. La ordinara nigeriano ne nur ne konas aliajn lingvojn, sed li ne povas skribi la propran. Se li volas lerni alian lingvon kiel entute fari? Mankas lernolibroj, mankas studoj pri pedagogiaj metodoj, mankas instruistoj, mankas plej baza klereco.

daŭrigo
sur p. 104

esperanto
junio
1964 103

Lingvoj en Afriko: laikula vidpunkto (daŭrigo)

Por tiuj kiuj tiel feliĉas viziti lernejon, la plej kutima sistemo de lingvolernigo estas unue instruado en la indiĝena (denaska) lingvo kaj poste iompostioma transiro al unu el la "mondaj" lingvoj — franca, angla, araba. En sia studo pri Sudano, W. A. Murray klarigas ke tio efektive signifas ke ĉiu universitata studento en Sudano konas du aŭ tre ofte eĉ tri lingvojn — la indiĝenan, la araban, kaj la anglan. La angla uziĝas ĉe universitata nivelo, kie la araba (la oficiala ŝtata lingvo) havas klarajn mankojn — ĉefe la manko de adekvata scienca kaj teknologia literaturo.

Lingvobaroj en lernejoj

En sia studo pri Ugando, Peter Wingard substrekas du gravajn malfacilaĵojn de ĉi tiu sistemo. Unue, la neevitebla almigro al la urboj kreas diverslingvanajn grupojn en unu malgranda areo — kaj povas okazi ke la infanoj en unu lernejo eĉ ne povas adekvate inter si kompreniĝi, por ne mencii la problemojn de instruado. Due, la transiro de lingvo al lingvo estas tre delikata procedo, kaj en klasoj tro grandaj (kiel ili kutimas esti) la studkapablo de la infanoj suferas proporcie kun ilia manko de kompreno. Inter la malpli inteligentaj s-ro Wingard trovis plurajn kiuj simple tute ne komprenis.

Rezulte, la infanoj ricevas parton de sia instruado en lingvo kiun ili ne adekvate komprenas. Ili perdas tempon, kie tempo valoras; ili perdas kuraĝon; ili eliras la lernejojn apenaŭ klerigitaj. Dum la cetero de siaj vivoj, ili kapablos balbuti tiun lingvon: nenion pli. Eĉ en la universitatoj okazas problemoj, precipe en tiuj landoj, ekzemple Etiopio kaj Sudano, kie la universitata lingvo ne estas la oficiala lingvo de la lando. Studentoj ne bone komprenas la prelegojn, kaj preskaŭ ĉiam ilia leĝrapido estas kripla, aŭ almenaŭ iome manka.

Multlingveco en Afriko do kostas al la koncernaj registaroj amasegon da mono kaj (kio eĉ pli bedaŭrindas) amasegon da laborhoroj. Eble ŝajnas strange ke la registaroj persistas ĉi tiun vojon. Sed la kialoj estas multaj. Oni multon aŭdas, almenaŭ inter la esperantistoj (ankoraŭ unu manifestiĝo de la esperantista naivismo), ke pro naciismaj kialoj la afrikanoj ne ŝatas la ekskoloniajn lingvojn. Iugrade tio eble pravas (s-ro Starr atestas tion en sia artikolo), sed memevidente (t.e. evidente al ĉiuj krom la esperantistoj) la avantaĝoj de la angla aŭ la franca estas grandegaj. Kial oni uzas ilin en la universitatoj? Ĉar la profesoroj — kaj ne forgesu ke multaj eŭropaj profesoroj estas kaj restas en Afriko — parolas tiujn lingvojn. Ĉar la afrikaj profesoroj studis per ili. Ĉar la intelektularo uzas ilin por *komuniki inter si*. Ĉar nur en tiuj lingvoj estas adekvata scienca kaj teknika literaturo, kaj terminoj.

„... necesas agi tuj.”

**Kiam finfine la diversaj
edukaj sistemoj fariĝos
stabilaj, oni malpli
multe emos fari ŝanĝojn.”**

Eviti ministrojn, ĝis...


Sed super la angla, k.a., Esperanto havas unu grandan avantaĝon. Ĝi estas facila — facila ankaŭ por afrikanoj. Tio signifas grandajn avantaĝojn por la eduka sistemo. Sed tiujn avantaĝojn ni ne povas eluzi ĝis ni havos antaŭ ni pli da faktoj. Kontraste al s-ro Starr¹, mi favoras sisteman eviton de ministroj de edukado ĝis la Esperanto-movado, prefere sub la gvido de UEA, faris detalan sciencon studadon de la metodoj transiri de indiĝena lingvo al Esperanto; pri rektametoda instruado; pri lernolibroj en Esperanto por kovri ĉiujn temojn de studado, en facila lingvo taŭga por elementlernejanoj; pri grandskala kaj rapidega tradukado de sciencaj verkoj en Esperanton (por universitata uzado); pri pedagogiaj metodoj; pri laborfortoj je nia dispono.

Ĉi-lasto punkto aparte gravas. Nuntempe, kvankam la franca, la angla, la araba, la portugala ne estas adekvate disvastigitaj nek komprenataj, tamen estas granda rezervo de fortoj por plibonigo de ilia konateco. Ili estas la lingvoj de la elituloj; ili kunligas Afrikon kun la ekstera mondo; jam ekzistas tra Afriko aroj da bibliotekoj en tiuj lingvoj, aroj da akademiaj komunumoj, aroj da ŝtataj oficistoj kiuj uzas ilin.

Wim de Smet saĝe diris en *Esperanto*: "Afrikanoj lernas nur tiujn lingvojn kiujn

D-ro Julius Njerere, Prezidanto de Tanganjiko kaj Zanzibaro, rilatas favore al Esperanto, sed restas skeptika pri ĝiaj eblecoj en Afriko. La popolnombrado listigas 104 tribojn en Tanganjiko, kaj la lingvaj grupoj (plejparte bantuaj lingvoj) estas tre multaj. La ĉefaj lingvoj estas la ĉaga, gogo'a, haja, irakva, masaja kaj njamŭezi-sukuma, el kiuj la laste menciitan parolas pli ol 1 1/2 da milionoj.

Krome estas uzata la sŭahila lingvo, kvankam la nombro de ĝiaj parolantoj ne estas konata. La sŭahila ekestis ĉirkaŭ la 11-a jarcento p.K. kiel lingvo de mikrasaj familioj en orienta Afriko, kaj alprenis iom post iom arabajn, persajn, bantuajn kaj eŭropajn lingvo-elementojn. Ĝi estis la unua skribita afrika lingvo antaŭ la alveno de eŭropanoj. Ĝi servas kiel intertriba lingvo en pluraj orientaŝaj landoj, kaj estas vaste uzata por radio-elsendoj kaj ĵurnaloj. Prezidanto Njerere favoras oficialigon de la sŭahila kiel nacia lingvo de Tanganjiko kaj Zanzibaro, kaj mem uzis ĝin en la parlamento.



ili vere bezonas. Do nur kiam Esperanto estas bezonata, ĝi vekos la intereson de la afrikanoj." Kompreneble. Nuntempe gravas simple la konkreta valoro de tiu aŭ alia lingvo. Resume, Esperanto havas la jenajn "valorojn":

- Ĝi estas facila (kaj do pli facile lernebla ol, ekz-e, la angla)
- Ĝi ŝparus tempon en la lernejoj
- Ĝi unuigus eksfrancajn kaj eksbritajn landojn
- Ĝi estas iugrade monda lingvo.

Kontraŭpeze al tio, la angla (ktp.)

- estas vaste konata kaj uzata tra la tuta mondo
- estas vaste konata kaj uzata en Afriko
- estas grava teknikologia kaj komerca lingvo
- havas grandajn rezervojn de instruistoj kaj ĉiuspecaj fakuloj.

Se ni povas trovi respondojn al tiuj lastaj kvar punktoj, kaj se ni povas pruvi la unuajn kvar (kio postulas objektivan sciencan studadon), ni povas pruvi la eblecon de ŝparo al landoj kie ŝparo urĝe gravas. Sed necesas agi tuj. Kiam finfine la diversaj edukaj sistemoj fariĝos stabilaj, oni malpli multe emos fari ŝanĝojn. Plue, nuntempe urĝe mankas adekvataj studoj de la afrika lingva situacio kaj ĝia rilato eĉ al la ekskoloniaj lingvoj. Mankas faktoj ĉiufle. Kaj faktoj ĉi tie similas al oro, kaj eble portus similajn rezultojn.

La CEA de Pola Esperanto-Junularo, kaj la ĉi-jara kongreso de la Esperanto-Ligo de Nordameriko, kies ĉefa temo estos afrikaj lingvo-problemoj, estas bonaj ekzemploj de pionira agado en tiu kampo. Nun necesas pli vasta esplorado kaj diskutado.

En *Languages in Africa* Esperanto menciigas unufoje. R. F. Amonoo, el Gano, diras jene:

Generale mi subtenas la opinion, ke lingvo estas metodo de komunikado kaj socia interrilato; ke ĝi estas ilo, aŭ helpo, de pensado; ke ĝi estas esprimo de kulturo... Ĉiu ajn lingvo, escepte de arte fabrikita lingvo kiel Esperanto, posedas tiujn kvalitojn."

Delira babilado pri 2896 lingvoj ne helpas ŝanĝi la opinion pri Esperanto kiun havas s-ro Amonoo. Necesas kelkaj faktoj. Nuntempe al neniu ministro de edukado ni povus ilin liveri.

¹. Revuo *Esperanto*, jul.-aŭg 1963 p. 122-3; *The International Language Esperanto, Common Language for Africa, Common Language for the World*, Tibor Sekelj, UEA, Rotterdam, 1962; *Pola Esperantisto*, okt.-dec. 1963, p. 6-8 k.a.

². Vidu speciale la "Afrikan Numeron" de *Tamen*, n-ro 9-10, 1962.

Nova granda agado de U.E.A.

Per sia Rezolucio A/RES/1844 (XVII) de la 19-a de decembro 1962 la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj decidis proklami la jaron 1965 "Jaro de Internacia Kunlaborado". En Unuiĝintaj Nacioj estas formita aparta Preparkomitato por prizorgi diversajn aranĝojn en tiu jaro. Ĝi turnis sin al diversaj neregistaraj organizaĵoj en konsultaj rilatoj kun la peto kontribui al la Jaro de Internacia Kunlaborado. La Estraro de UEA respondis, ke UEA kaj ĉiuj landaj kaj fakaj organizaĵoj ligitaj al ĝi estas pretaj partopreni en diversaj agadoj laŭ la sugestoj de la Preparkomitato. La Estraro de UEA donos ĝustatempe konsilojn al la landaj kaj fakaj organizaĵoj pri la metodoj de agado konforme al la plano ricevita de la Preparkomitato de U.N. kaj al ĝiaj eventualaj pliaj sugestoj.

Tio, tamen, estas nur unu flanko de la afero. Por ĉiu, kiu studis iom profunde la diversajn aspektojn de la nuntempaj internaciaj rilatoj, estas klare, ke la lingvodiverseco prezentas unu el la plej gravaj obstakloj al plua intensigo kaj vastigo de internacia koeperado sur ĉiuj niveloj. Tial la Jaro de Internacia Kunlaborado prezentiĝas kiel taŭga okazo por atentigi U.N., la Ŝtatojn-Membrojn kaj ĝenerale la publikon pri la solvo, kiun prezentas la Internacia Lingvo. Antaŭ ol fari konkretan proponon al la Estraro de UEA pri tiu ĉi dua aspekto, la subskribinto en sia funkcio de ĝenerala sekretario konsultis per aparta cirkulero la landajn kaj fakajn asociojn, kaj la komitatanojn de UEA. La demando starigita en la enketfolio estis ĉu UEA organizu mondkalan kampanjon favore al Esperanto kaj, se jes, ĉu la respondantoj pretas kunlabori kaj helpi ĝis maksimumo por la realigo de la propono.

Ĉiuj respondoj ricevitaj ĝis la komenciĝo de la printempa kunsido de la Estraro — kaj ankaŭ la respondoj ricevitaj post tiu dato — estis pozitivaj kaj multaj aldonis utilajn sugestojn. Nur unu landa asocio respondis negative, sed la Estraro esperas, ke ankaŭ ĝi solidariĝos kun la grandega plimulto kaj aktive partoprenos en tiu grava laboro.

La Estraro pritraktis plej atente la aferon en sia kunsido de la 22-a de marto.

Aparte grava estis la demando ĉu oni entreprenu grandskalan kampanjon por varbi subskribojn je propono prezentota al Unuiĝintaj Nacioj. Post vasta interŝanĝo de pensoj la Estraro unuanime opiniis, ke oni ne povas preterlasi tian unikan okazon kaj ke necesas ekagi. La diversaj detaloj de la agado estos komunikitaj ĝustatempe al ĉiuj landaj asocioj, kunlaborantaj organizaĵoj, Esperanto-gazetaro, radio-stacioj kaj aliaj instancoj. La plano antaŭvidas prezenton de memorandoj al U.N. kaj Ŝtatoj-Membroj, ekinteresiĝon de internaciaj kaj landaj fakaj neesperantistaj organizaĵoj, intensigon de la klopodoj vastigi la instruadon de Esperanto en la lernejoj, kampanjon en la monda gazetaro, revuoj, radio,

televideo, per prelegoj, ekspozicioj kaj diversaj aliaj manieroj.

La kerna punkto estas amasa propono al Unuiĝintaj Nacioj "solvi la lingvan problemon per efektiva kaj efika helpo al disvastigo de la neŭtrala Internacia Lingvo Esperanto, rekomendante ankaŭ al la Ŝtatoj-Membroj progresigi ĝian instruadon kaj stimuli ĝian uzon en la internaciaj rilatoj de la popoloj".

La Estraro de UEA, kies membroj apartenas al diversaj nacioj, estas konvinkita, ke la teksto de la propono estas taŭga el vidpunktoj nacia, politika, religia kaj aliaj, tiel ke absolute ĉiu persono, kiu aprobas la ideon de internacia kunlaborado kaj komprenas la lingvan obstaklon, povas ĝin subskribi.

Necesas nun kolekti kiel eble plej multajn subskribojn de personoj apartenantaj al ĉiuj eblaj profesioj kaj okupoj ekde gelernantoj ĝis membroj de Sciencaj Akademioj, aŭ, por resti en la kadroj de la klasigitaj profesioj, ekde ŝtatestroj ĝis dommastrinoj.

Unu ekzemplero de la folio kun la teksto de la propono kaj koncizaj instrukcioj por la kolektantoj de la subskriboj estas aldonita al tiu ĉi numero de nia revuo. La Estraro decidis, ke la propono estu prezentita en Esperanto kaj la diversaj naciaj lingvoj. UEA mem presigos sufiĉan kvanton da ekzempleroj en tri el la oficialaj lingvoj de U.N., nome en la angla, franca kaj hispana. La respektivaj angla aŭ franca aŭ hispana tekstoj estos presitaj en la libera spaco flanke de la Esperantlingva. La samon faros UEA rilate la nederlandan tekston en interkonsento kun la Nederlanda Asocio. La aliaj landaj asocioj estas petataj presigi sur la sama loko la tradukon en siaj respektivaj naciaj lingvoj. Unuopuloj en landoj, en kiuj neniu Esperanto-organizaĵo prizorgas la presigon de la traduko, povas facile mem tajpi la tradukon en sia lingvo. La ĉefa afero estas havi bonan nacilingvan tradukon kaj kolekti amason da subskriboj ĉu de unuopuloj ĉu de organizaĵoj. Necesas ankaŭ atente observi la instrukciojn dorsflanke de la folio, por ke ĉio evoluu glate, tiel ke en oktobro de 1965 UEA povu prezenti la proponon kun ĉiuj subskriboj al la Sekretariato de U.N.

La Estraro de UEA komisiis la subskribinton organizi la tutan agadon. En la nomo de la Estraro de UEA kaj de ĉiuj landaj asocioj, fakaj organizaĵoj kaj komitatanoj de UEA, kiuj aprobis la ideon, mi do alvokas la Esperanto-organizaĵojn kaj ĉiujn unuopajn esperantistojn komenci tuj la kolektadon de subskriboj inter siaj gekonatoj kaj geamikoj, en la lokoj de ofico aŭ laboro, kiam ajn prezentiĝas taŭga okazo. La kolektado de subskriboj ebligos ankaŭ informi objektivaj pri Esperanto, kio siavice helpas al la disvastigo de la lingvo. Se ĉiu streĉos ĝis maksimumo siajn fortojn, ni certe sukcesos fari grandan, eble eĉ decidan, paŝon antaŭen en la Jaro de Internacia Kunlaborado.

Prof. D-ro Ivo Lapenna

Unesko-Projekto „Asociiĝintaj Lernejoj”

La Projekto de UNESKO sub la titolo "Asociiĝintaj Lernejoj en Edukado por Internacia Kompreniĝo kaj Kunlaborado" ekestis surbaze de diversaj rezolucioj akceptitaj de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en 1952. En la komenco ĝi ne estis konata laŭ tiu ĉi titolo (angle: *Associated Schools Project in Education for International Understanding and Co-operation*), sed sub la titolo "Programo de Koordinitaj Eksperimentaj Aktivecoj en Lernejoj de Ŝtatoj-Membroj". Laŭ la menciitaj rezolucioj, la celo de la Projekto estis kuraĝigi la edukadon pri la celoj kaj agadoj de Unuiĝintaj Nacioj kaj de la Specialigitaj Organizaĵoj, kiel ankaŭ pri la principoj de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Paralele kun la evoluo de la Projekto kaj la partopreno de ĉiam pli granda nombro da lernejoj de diversaj landoj, ĝia programo iom ŝanĝiĝis. Hodiaŭ ĝi estas konata kiel Projekto de "Asociiĝintaj Lernejoj", kio estas mallongigo de la supra kompleta titolo.

La Projekto konsistas en tio, ke lernejoj de diversaj landoj — Ŝtatoj-Membroj de UNESKO — libervole, kun la aprobo de la edukaj aŭtoritatoj kaj, se necese, de la nacia UNESKO-Komisiono, decidis antaŭenigi ĉe la gelernantoj internacian kompreniĝon kaj kunlaboradon. La lernejoj elektas apartan studon de iu temo el inter la jenaj ĉefgrupoj: (i) Instruado pri Unuiĝintaj Nacioj, (ii) Homaj Rajtoj, (iii) Aliaj Landoj. Ne necesas elekti plurajn temojn, sed sufiĉas nur unu laŭ la bontrovo de la lerneja aŭtoritato de la koncerna lernejo. Ekzemple, oni povas elekti sub "Aliaj Landoj" apartan, pli intensan studadon de la historio, geografio, literaturo, kulturo ĝenerale, lingvo aŭ kiu ajn alia aspekto de kiu ajn alia lando.

Estas tute certe, ke bonegaj rezultoj povus esti atingitaj, tute speciale en la temaro sub (iii), en la lernejoj, en kiuj Esperanto estas instruata. Ĉar la Projekto rilatas al gelernantoj de tre malsamaj aĝoj, ekde 11-jaraj ĝis 19-jaraj, oni facile povas, depende de la aĝo de la gelernantoj, utiligi Esperanton por intensigi la studon ĉu de geografio aŭ historio, aŭ de ambaŭ de iu lando, ĉu de ĝiaj literaturo aŭ kulturo ĝenerale. Se, ekzemple, jugoslavia lernejo decidus dediĉi sian studon al la sveda literaturo, tute ĝi trovus unuarangajn tradukojn el la sveda literaturo en Esperanto. Same tiel, sveda lernejo trovus abundan literaturon de jugoslaviaj popoloj en Esperanta traduko. La Konsulta Komisiono pri Lernejoj estas konvinkita, ke per iom da bona volo la rezultoj atingeblaj per Esperanto sur tiu ĉi kampo povus konsiderinde superpasi la rezultojn, kiujn atingas la aliaj lernejoj nepovantaj utiligi la avantaĝojn de komuna lingvo. La KKL, do, varme rekomendas al ĉiuj lernejoj, en kiuj Esperanto estas instruata, esplori plej

serioze la eblecojn kaj, se la cirkonstancoj permesas, aliĝi tuj al la Projekto.

Kion necesas fari tiucele?

Unuavice, la lernejo deziranta partopreni en la Projekto, devas sin turni al la Nacia UNESKO-Komisiono de sia propra lando petante detalajn informojn pri la Projekto kaj pri la kondiĉoj de aliĝo. Taŭga dokumento, en kiu troviĝas multaj detaloj, estas la dokumento de UNESKO EA/Sèvres/6 de la 15-a de oktobro 1963, eldonita en la angla kaj franca, verŝajne ankaŭ en la aliaj laboraj lingvoj de UNESKO. Trastudinte la menciitan dokumenton kaj eventuale aliajn dokumentojn, kiujn liveros la Nacia UNESKO-Komisiono, la koncerna lernejo konstatos ĉu ĝi povas aliĝi. Se jes, necesas turni sin al la edukaj aŭtoritatoj por aprobo kaj post tio komuniki la aliĝon al la nacia UNESKO-Komisiono, kiu pri tio informos la Sekretariaton de UNESKO en Parizo. En la aliĝo oni povas menci i Esperanton kiel rimedon por la aparte elektita studo, sed tio ne estas necesa. La ĉefa afero estas efektive utiligi Esperanton por la studado de la elektita temo. Nur post la aliĝo la koncerna lernejo bonvolu informi pri la aliĝo la Konsultan Komisionon pri Lernejoj pere de s-ro R. Markarian, kiu kontaktigos reciproke ĉiujn asociiĝintajn lernejojn, por ke ili pli efike utiligu Esperanton.

Necesas aldoni, ke la asociiĝintaj lernejoj kunvenas pere de siaj reprezentantoj de tempo al tempo en internaciaj konferencoj, kiujn subvencias UNESKO. Prezentiĝas do taŭga okazo ankaŭ por ĉiuj lernejoj, en kiuj Esperanto estas instruata kaj kiuj asociiĝos al la Projekto, partopreni en tiuj konferencoj.

La KKL esperas, ke multaj lernejoj, en kiuj Esperanto estas instruata, konsideros plej atente la Projekton kaj, se iel eble, aliĝos al ĝi. Se oni deziras partopreni en la Projekto ekde la lerneja jaro 1964/1965, oni devas ekagi tuj, ĉar alie estos tro malfrue.

LERNEJA BULTENO

La Estraro de UEA aprobis la publikigon de Lerneja Bulteno: ĝi havos ĉiam po 4 paĝoj en la decembra numero de "Esperanto", kaj po 2 paĝoj 2-3 pliajn fojojn jare laŭbezzone. Represaĵo de la Bulteno estos regule sendata al ĉiu, kiu aliĝis aŭ aliĝos al Interlerneja Interkonsento, konforme al la decido de la Beograda Konferenco, komunikita al ĉiuj partoprenintoj de tiu Konferenco kaj al ĉiuj lernejoj, en kiuj Esperanto estas instruata, per la cirkulero de la 28-a de februaro 1964. Escepte, tiu ĉi numero estas sendata al ĉiuj, kiuj ricevis la n-ro 1. La n-ro 3 ricevos nur tiuj, kiuj aliĝos al Interlerneja Interkonsento. La aliĝojn oni bonvolu komuniki al s-ro Peter Zlatnar, Rimska 7/II, Ljubljana, Jugoslavio.

Listo de rekomenditaj lernolibroj, legolibroj kaj aliaj helpiloj

Celo: Inter instruistoj ofte esprimiĝis la sento ke iu devus starigi liston de lernolibroj, legolibroj, kaj aliaj helpiloj, taŭgaj al lerneja uzo. Tion nun faris la KKL de UEA en la espero, ke ĝi utilos ne nur al individuaj Esperanto-instruistoj, sed ankaŭ al landaj Societoj de Esperanto-Instruistoj. En niaj listoj *ne* aperos nacilingvaj libroj. Tiujn la landaj Societoj mem devas rekomendi en la propraj landoj. Niaj listoj, kune kun tiuj de la landaj Societoj povus esti aparte utilaj al instruistoj, nove aliĝintaj al la Movado, kiuj, post la akiro de baza lingvoscio, sentas sin pretaj ekinstrui la Internacian Lingvon.

Kompletigo de la listoj: Se iu instruisto aŭ instruista Societo, pro propraj spertoj, povas iel ajn kompletigi niajn listojn, ili bonvolu sendi siajn sugestojn al S-ro R. Markarian, 62, Rother Crescent, Gossops Green, Crawley, Sussex, Britujo.

Havebleco de la libroj k.t.p.: Preskaŭ ĉiuj eroj en niaj listoj estas haveblaj pere de la Libroservo de UEA.

Enkonduko al la lernejo de nova libro: Kiel okazas en la instruado de aliaj studobjektoj, tiel ankaŭ en Esperanto-instruado, estas nepre konsilinde, ke antaŭ ol enkonduki novan libron la instruisto aĉetu kaj tralegu koncernan verkon.

Klasigado laŭ utilo kaj facileco:

- A Elementaj Lernejoj (ĝis aĝo 11 jaroj).
- B Duagrada Lernejoj (post aĝo 11 jaroj).
- i Taŭga por *intensa* klaslegado kun la instruisto.
- 1 Taŭga por *libera* legado en aŭ ekster la klasĉambro.
- b Taŭga por la lerneja biblioteko.
- d Taŭga kiel *donaco* al lernanto de la koncerna nivelo.
- 1. En la koncerna sekcio A aŭ B la plej facilaj libroj.
- 2. En la koncerna sekcio A aŭ B libroj pli malfacilaj ol (1)
- 3. En la koncerna sekcio la plej malfacilaj libroj.

A. ELEMENTAJ LERNEJOJ

Lernolibroj				Legolibroj			
Sub la Verda Standardo I (Nederlanda)	6.00			Kampomuso Ekskursas (Francaj)	Prozo	3.00	
Sub la Verda Standardo II (Nederlanda)	8.40			Aladino (Franca)	Prozo	3.00	
Sub la Verda Standardo-Gvidilo	17.60			La Ŝtelita Lampo (Jugoslava)	Prozo	9.20	
Tom kaj Tina (Dana)	12.00			Cent Ĝojkantoj (Brita)	Poezio	12.00	
Legolibroj				Esperanto por Infanoj (Brita)	Prozo	7.20	
A/ild/1				Kultura Vivo de la Ĉinaj Laboristoj (Ĉina)			
La Nigra Kokino (Pola)	Prozo	3.50		Bildoj kun simplaj tekstoj A/lbd/3	Bildoj	4.00	
La Du Pupoj (Brita)	Prozo	3.00		Bildlibro Pri Bestoj (Brita)	Bildoj	30.00	
Dua ABC Libro (Brita)	Rimoj	2.40		Bienbestaj Amikoj (Kanado)	Prozo	7.40	
Tria ABC Libro (Brita)	Rimoj	2.40		Penjo kaj Ŝiaj Amikoj (Kanado)	Prozo	12.20	
Rimoj por Infanoj (Brita)	Rimoj	3.60		A/bd/3			
A/id/1				La Marvirineto (Dana)	Prozo	30.00	
Bonvolu Esti Mia Amiko (Kanada)	Teatraĵoj	8.00		Kantoj			
A/ilbd/1				La Juna Vivo (Nederlanda) kun arioj		3.00	
Kaj Nun Ni Eklaboru (Franca)	Prozo	3.00		Internacia Kantaro (Leipziga) kun muziknotoj		13.00	
Pli kaj Pli Rapide (Franca)	Prozo	3.00		nur la vortoj		5.00	
Kun Niaj Amikoj La Bestoj (Franca)	Prozo	3.00		Sankta Nikolao (Nederlanda)		6.00	
Eta Plumba Soldato (Franca)	Prozo	3.00		Ludoj			
Vespero en La Ĉirko (Franca)	Prozo	3.00		Pulĉinelo (Kanada)		7.00	
A/ibd/1				Ĉu Vi Ŝatus Orbitri? (Kanada)		5.00	
Mi Volis Viziti Lernejon (Ĉina)	Bildrakonto	2.40		Gazeto			
A/ilbd/2				'Planteto' (Internacia)	Jarabono	10.00	
Mojca Etulino (Jugoslava)	Prozo	3.00		Porinstruista Libro			
Karpetoj Transsaltas La Drakpordon (Ĉina)	Prozo	2.60		Infanludoj — Fakterminaro (Kanado)		4.00	
Kiel Lu Ban Majstriĝis (Ĉina)	Bildrakonto	1.00		Diskoj			
La Varma Rivereto (Jugoslavia)	Prozo bind. broŝ.	7.60 3.80		Perfekta Prononcado (1) 45 rpm.		12.00	
A/ilbd/3				Diapozitivoj — La Movado			
La Ratkaptisto el Hamleno	Prozo	3.00		Serio 1. 30 diapozitivoj		88.00	
La Kuraĝa Tamburisto	Prozo	3.00		Serio 2. 47 diapozitivoj (la 30 kaj 17 pluaj)		135.00	
Orharulo kaj Ruĝakresto	Prozo	3.00		Mendu rekte ĉe LENTAIGNE, 3 Ave de la Gaillarde, Montpellier, Francujo			

Lernolibroj

Junulkurso Ilustrita (SAT) 14.40

Legolibroj

B/lbd/1

Pejzaĝoj de Ĉinio (Ĉina) Fotoj 10.00

B/ilbd/1

Cent Ĝojkantoj (Brita) Poemoj 12.00

Karlo (Svisa) Prozo 3.00

Niko kaj Nina (Germana) Prozo 9.60

La Junaj Detektivoj (Brita) Prozo 4.80

Erna (Nederlanda) Prozo 6.00

B/ilbd/2

Japanaj Fabeloj Prozo 6.40

Ĉefaj Fabeloj Prozo 8.00

B/ild/2

La Okcidenta Ĉambro (Ĉina) Bildrakonto 3.00

B/lbd/2

Infanoj Ne Konas Limojn

Fotoj kaj Teksto 11,80

Ni En Skandinavio (Sveda) Prozo 6.40

B/bd/2

Amuzo Per Scienco (Brita) Prozo 15.00

Poŝtmarkoj de la Ĉina

Popola Resp. Klariga historio 17.00

La Juna Korespondanto

(Pola) Gvidlibro 3.00

Arboj de la Arbaro (Brita) Prozo 2.40

B/ild/3

Sinjoro Dongguo (Ĉina) Bildrakonto 3.00

B/ilbd/3

La Forto de l' Vero (Dana) Prozo 9.60

Okazas Nenio (Dana) Prozo 6.00

Sageoj kaj Rakontoj

Laŭlonge de la Rejno Prozo 11.40

La Verda Koro (Hungara) Prozo 7.00

En Vagono (Rusa) Prozo 3.00

Knabino kaj Garolo (Ĉina) Poezio 6.00

(Bildrak)

La Alaska Stafeto (Ĉeĥa) Prozo 14.40

La Vivo de Zamenhof (Svisa) Prozo 13.00

Analfabeto; Butono

(Jugoslava) Teatraĵoj 3.20

Infanoj en Torento 1 (Sveda) Prozo 12.00

Infanoj en Torento 2 (Sveda) Prozo 12.00

La Belan Pacon (Japana) Prozo 4.80

Fabletoj por etuloj

(Jugoslava) Poezio 7.60

Provinca Gastejo

(Jugoslava) Prozo 3.20

Teatro en Societo

(Jugoslava) Teatraĵoj 5.00

Koloroj (Hungara) Prozo 12.00

Kanakano el Kananam

(Aŭstralio) Prozo 32.00

Virino Ĉe la Landlimo Teatraĵoj 28.00

(Brita)

La Marvirineto (Dana) Prozo 30.00

B/ilb/3

Prologo (Rusa) Miĥalski Poezio 2.00

Porinstruistaj Libroj

Esperanto kaj Lernejo (Jugoslava) 15.20

Memorlibro Pri la Zamenhof-Jaro 50.00

Zamenhof, Aŭtoro de Esperanto bind 57.60

(M. Boulton) broŝ. 46.60

Kvar Prelegoj (Kralj) 15.20

Plena Gramatiko 1 33.60

Plena Vortaro 44.40

Naŭlingva Etimologia Leksikono 30.00

Lingvaj Respondoj bind. 30.00

broŝ. 23.00

Esprimo de Sentoj en Esperanto 5.00

Proverbaro Esperanta 22.80

Gazetoj

'Kontakto' (Speciala abonprezo por lernejoj kiuj mendas minimume 10 ekz. sur oficiala skribpapero po 10 steloj)

32.00

'Homo kaj Kosmo' Sciencrevuo por

junuloj. Jarabono 20.00

Diskoj kaj Sonbendoj

Vidu la listojn en la Jarlibro.

DUA LERNEJA KONFERENCO

Ĝi okazos en Britujo fine de aŭgusto, 1965, SBET transprenis la organizon kaj s-ro R. Markarian jam entreprenis la unuajn paŝojn por trovi konvenan konferencojn. En la sekvanta numero de la Bulteno aperos detaloj.

FONDAĴO LERNEJOJ

(Helpo al Infanoj)

La Estraro unuanime aprobis la ideon de "Fondaĵo Lernejoj", sed decidis, ke la subtitolo estu "Helpo al Infanoj". La mono estos kolektata en la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. La Fondaĵo estos utiligata ekskluzive por helpi al la infanoj akiri lernolibrojn, taŭgan legaĵon kaj, se iel eble, ankaŭ por subvencii ilian partoprenon en internaciaj infanrenkontiĝoj. Prof. I. Lapenna, membro de la KKL, faris la unuan donacon de 50 gld. al tiu Fondaĵo. Kontribuojn akceptas la C.O. de UEA kaj ĉiuj ĉefdelegitoj kaj perantoj de UEA. Bonvolu ĉiam klare indiki "Por la Fondaĵo Lernejoj".

KONSULTA**KOMISIONO PRI LERNEJOJ (KKL)**

Generalaĵoj kaj rilatoj kun internaciaj instancoj: Prof. D-ro Ivo Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Mddx, Britujo. Rilatoj kun profesiaj instruistaj organizaĵoj: S-ro E. Malmgren, Heleneborgsgatan 6, Stockholm, Svedujo.

Pedagogiaj demandoj: S-ro R. H. M. Markarian, 62 Rother Crescent, Gossops Green, Crawley, Sussex, Britujo.

Organizaj demandoj: S-ro P. Zlatnar, Rimska 7/II, Ljubljana, Jugoslavio.


Bonvolu ĉiam turni vin al la kompetenta membro laŭ la supraj indikoj.



Moderna Klinika Hospitalo de la Medicina Fakultato de Montevideo, en kies deksesta etaĝo troviĝas la "Servicio de Fisiología Obstétrica" (Obstetrika Fiziologia Servo), kie esplorsciencista laborgrupo atingis tre gravajn eltrovojn en tiu fako.

Montevideo, grava centro de sciencaj esploroj

Elektronaj aparatoj uzataj por kontroli la funkciojn de la patrino kaj de la feto dum la akuŝo. — De maldekstre, la jenaj sciencistoj: (1) D-ro José Bieniarz, (2) D-ro Juan J. Poseiro, (3) D-ro Roberto Caldeyro Barcia, (4) D-ro Carlos Méndez Bauer, kaj (5) D-ro Serafín V. Pose.



Valoraj eltrovoj pri akuŝoscienco

Unu el la ĉefaj ĵurnaloj en Svedujo, "Svenska Dagbladet", en sia numero de 8 sept. 1963 publikigis artikolon sub titolo "Urugvaja aparato igas pli sekuraj la akuŝojn". Ĉi tiun artikolon poste sendis la Urugvaja Ambasadado en Stokholmo al ĉiuj ĵurnaloj en Montevideo, kiuj siavice diskonigis ĝin, kaŭzante sensacion en la urugvaja publiko.

Sekve de tiu publikigo, ĵurnalista kunveno okazis en la 16-a etaĝo de la Klinika Hospitalo de Montevideo, kie troviĝas la *Servicio de Fisiología Obstétrica* (Obstetrika Fiziologia Servo). La ĉefestro de tiu fako, Doktoro Roberto Caldeyro Barcia, profesoro pri Fiziologio en la Medicina Fakultato de la urugvaja ĉefurbo, bonvole akceptis la ĵurnalistojn kaj donis al ili kompletajn informojn kaj klarigojn pri tiu Servo.

La Obstetrika Fiziologia Servo de la montevidea Klinika Hospitalo estas institucio por scienca originala esploro kaj por speciala instruado en la kampo de la Fiziologio de l' Reprodukto, precipe en la perinaska periodo. Oni emfaze studas la funkciojn de la graveda utero, de la placentoj, de l' feto kaj de la ĵusnaskito, kaj ankaŭ la laktacion. La esplorojn oni faras precipe en la homa speco.

Krom tio la Obstetrika Fiziologia Servo kunlaboras pri taskoj de esplorado en aliaj temoj de Fiziologio kaj Fiziopatologio Homaj.

La esploroj pri Obstetrika Fiziologio estis iniciatitaj de D-roj Roberto Caldeyro Barcia (fiziologo) kaj Hermógenes Alvarez (obstetristo kaj ginekologo) en 1947. Poste la scienca laborgrupo pligrandigis per aliĝo de novaj diversfakaj esploristoj: fiziologoj, obstetristoj, ginekologoj, biofizikistoj, biokemiistoj, pediatriistoj, elektronaj teknikistoj, ktp.

Jen la metodserio, kiu elvoviĝis ekde la jaro de ĝia iniciato en 1947:

La unua metodo kontrolas dum la akuŝo la funkciojn de la feto kaj de l' patrina utero, kiu estas la akuŝmotoro; per ĝi oni registras la premon de la utera enhavo, t.e. de la amnia likvaĵo. Tiu ĉi metodo estis eltrovita en 1947 de la supre cititaj D-roj Caldeyro Barcia kaj H. Alvarez, kaj poste, en 1950, perfektigita de D-roj Juan J. Poseiro kaj Serafín V. Pose (obstetristoj kaj ginekologoj). Nuntempe tiu ĉi metodo estas adoptita en preskaŭ ĉiuj universitatoj de la mondo. En 1955 oni kreis la mezurunon de la utera aktiveco, kiun oni distingas per la nomo "Montevideo-unuo", kaj ĝi estas uzata en ĉiuj centroj de esploro pri tiu ĉi fako.

La dua metodo kontrolas elektrone la frekvencon de la korbato en la feto, kaj ĝi donas tre valoran informadon pri la stato de l' feto dum la akuŝo. Ĝi estas tre utila, ĉar permesas diagnozi frutempe suferon de la enutera feto, kaj tiel apliki adekvatan kuracilon antaŭ ol la feto estos suferinta daŭran difekton. Tiamaniere oni povas preventi cerbajn lezojn, kiuj kaŭzus paralizon, epilepsion, mensan malkapablon, blindecon aŭ aliajn nervajn malsanojn. Tiu ĉi metodo estis elvolvita en 1958 per la

kunlaborado de D-roj Juan J. Poseiro, Carlos Méndez Bauer kaj José Bieniarz (ĉiuj obstetristoj kaj ginekologoj). La elektronan parton de la metodo prizorgis la teknikisto S-ro Jorge Pantle.

La tria metodo kontrolas la staton de la cirkulado ĉe la patrino, pere de la registrado de l' arteria tensio en la diversaj partoj de la cirkula sistemo. Ĝi estas tre grava ne nur por la patrino mem, sed ankaŭ por tenadi la feton en la plej bonaj kondiĉoj. Tiu ĉi metodo estis elvolvita kun la kunlaborado de D-ro José Bieniarz.

Manko de oksigeno

La kvara metodo kontrolas la provizadon de oksigeno el la patrino al la feto tra la placenton, dum la tuta akuŝtempo. La manko de oksigeno estas unu el la ĉefaj kaŭzoj de cerbaj lezoj ĉe la feto dum la akuŝado, kaj de tio sekvas la graveco kontroli la kvanton de oksigeno uzebla, kiu ĉiumomente troviĝas en la fetaj histoj. Tiu ĉi metodo elvolviĝis kun la kunlaboro de la obstetristo kaj ginekologo D-ro Serafín V. Pose kaj de la biokemiisto S-ro Luis A. Escarcena.

La kvina metodo permesas dozadi en la sangon la hormonon ocitodino, kiu stimulas la uteran aktivecon ĉe la patrino. Ĉi tiu hormono laŭŝajne ludas gravan rolon en la ekkomenco kaj daŭrigo de la akuŝado. Por la elvolviĝo de tiu ĉi metodo estis necesa la kunlaborado de du biokemiistoj, Prof. Juan A. Coch kaj Prof. Jorge Brovetto, kaj de du fiziologoj, D-roj Carlos Fielitz kaj Héctor M. Cabot.


Unu plia metodo ne rilatas kun la akuŝo; ĝi estas elvolvita por esplori la funkciojn de la mama glando dum la laktacio. Ĝi estas esplorita de D-roj Y. Sica Blanco kaj Carlos Méndez Bauer.

Estas necese rimarkigi la gravecon de la kunigo en laborgrupon de diversaj kapablaj fakuloj, kiel tiuj laborantaj en la Obstetrika Fiziologia Servo, por la scienca esplorado per modernaj metodoj, kies komplekseco preterpasas tion, kion unu sola sciencisto povas fari. La plimulto el la esploristoj laboras laŭ reĝimo de tuta sindediĉo.

Surbaze de trejna programo pri esplorado de la Lernejo por Titoluloj de l' Medicina Fakultato, la Obstetrika Fiziologia Servo havigis al sciencaj centroj en Eŭropo, Usono kaj Latina Ameriko, multnombrajn fakistojn, kiuj ekde la jaro 1950 uzas en universitatoj kaj hospitaloj la metodojn eltrovitajn en Montevideo. La gravaj temoj esploritaj kaj tiuj studotaj, kaj la rimarkindaj rezultatoj atingitaj en Fiziologio de la Reproduktado, donis al ĝi la agnoskon de internaciaj organizoj kaj la laŭdojn de sciencistoj kaj gazetoj en diversaj landoj. Tiuj rezultatoj estas speciale gravaj en rilato kun la determino de la patrinaj kaj fetaj kondiĉoj dum la akuŝdaŭro, kiuj permesas eviti neripareblajn sekvojn kaj sekurigi la elvolviĝon de normalaj infanoj kaj de integraj homoj.

La esplorkunlaboroj estas faciligataj kaj stimu-

lataj de la montevidea Universitato, de l' Medicina Fakultato kaj de la Klinika Hospitalo. Krom tio, gravan monhelpon donis la jenaj institucioj: Komitato por Scienca Esplorado de la Universitato de Montevideo, Rockefeller Foundation (New York), Josiah Macy Jr. Foundation (New York), National Institutes of Health (Bethesda, Md., Usono) kaj Organizo de la Amerikaj Ŝtatoj. La nomitaj usonaj institucioj kontribuis per 445.000 dolaroj proksimume ekde la jaro 1954. La Organizo de la Amerikaj Ŝtatoj pagas la plej multajn stipendiojn el tiuj, kiujn ricevas la eksterlandaj kuracistoj, kiuj venas al Montevideo por praktikadi en la Obstetrika Fiziologia Servo. Ĝis la jaro 1962 venis 25 kuracistoj el Latina Ameriko kaj naŭ el Norda Ameriko kaj Eŭropo. La kuracistaj stipendiuloj restas unu ĝis du jarojn por kompletigi sian trejnadon pri esplorado. Nuntempe estas dek unu eksterlandaj kuracistoj, kiuj ricevas trejnan kurson; ili venis el Kanado, Usono kaj el diversaj



Akuŝĉambro, kie la akuŝantinoj estas flegataj per la elektrona registrado de la amnia tensio, korbata frekvenco de la feto, arteria tensio, vejna tensio, ktp. Tra la fenestro en la fono oni vidas la elektronajn aparatojn utiligatajn por la koncernaj fiziologiaj registradoj en ĉiu akuŝo.

latinamerikaj landoj. Al tiuj aldoniĝas en la proksima jaro aliaj kuracistoj venontaj el Japanujo kaj el aliaj sciencaj centroj de la mondo. Tiel la Obstetrika Fiziologia Servo pligrandigas sian bonegan agadon en la servo de la patrinoj kaj infanoj.

M. Fernández Menéndez

Por pliaj informoj oni skribu al jena adreso: Servicio de Fisiología Obstétrica, Hospital de Clínicas - piso 16, Avenida Italia, Montevideo (Urugvajo).

En bela ĝardeno, kie la radioj de aŭtuna suno ŝajnas malfruiĝi pro plezuro, sub ĉielo jam verdeta kie oraj nuboj ŝvebas kiel vojaĝantaj kontinentoj, kvar belaj infanoj, kvar knaboj, sendube teditaj de ludo, interparolis.

Unu diris: "Hieraŭ oni kondukis min al teatro. En grandaj kaj malgajaj palacoj, ĉe la fundo de kiuj oni vidas la maron kaj la ĉielon, viroj kaj virinoj, seriozaj kaj malgajaj ankaŭ,

Krom la monde konata poemaro "La floroj de l' malbono", eldonita en Esperanto en 1957 en la elstara aranĝo kaj traduko de Kalocsay-Waringhien, la verkaro de la franca poeto Charles Baudelaire konsistas ĉefe en poeziaj prozaĵoj kaj kritikaj artikoloj pri literaturaj kaj artaj temoj. "La emoj" memorigas pri multaj liaj poemoj.

sed multe pli belaj kaj multe pli bone vestitaj ol tiuj, kiujn ni ĉie vidas, parolas per kantanta voĉo. Ili sin minacas, ili petegas, ili afliktiĝas kaj ofte ili apogas sian manon al ponardo enigita en ilia zono. Ha! tio estas tre bela! La inoj estas multe pli belaj kaj multe pli grandaj ol tiuj, kiuj venas nin viziti hejme, kaj kvankam pro siaj grandaj kavaj okuloj kaj siaj flamaj vangoj ili aspektas terure, oni ne povas ne ami ilin. Oni timas, oni ploremas, kaj tamen kontenta oni estas.... Kaj plue, kio estas pli strangeta, tio dezirigas esti vestita same, fari kaj diri la samon, kaj paroli per sama voĉo...."

Unu el la kvar infanoj, kiu jam de kelke da sekundoj ne aŭskultis plu la parolon de sia kamarado kaj observis kun miriga persisto mi ne scias kiun punkton de la ĉielo, diris subite: "Rigardu, rigardu tien...! Ĉu vi vidas lin? Li sidas sur tiu izola nubeto, tiu nubeto fajrokolora kiu lante antaŭeniras... Ankaŭ li, ŝajnas kvazaŭ li rigardus nin."

"Nu, kiu do?" demandis la aliaj.

"Dio!" respondis li per tono de perfekta konvinkiĝo. "Ha! Li estas jam tre malproksima; baldaŭ vi ne plu povos vidi lin. Sendube li vojaĝas por viziti ĉiujn landojn. Rigardu, li tuj pasos malantaŭ tiu arbovico kiu staras preskaŭ ĉe l'horizonto.... kaj nun li descendas post la preĝejturo. Ha! oni plu ne vidas lin!" Kaj la infano restis longtempe turnita al la sama direkto, fiksante ĉe la linio kiu apartigas la teron de l' ĉielo, okulojn kie brilis nedirebla esprimo de ekstazo kaj de bedaŭro.

"Li ja estas stulta, tiu, kun sia Bondio, kiun li solà kapablas videti?" diris tiam la tria, kies eta tuta persono estis markita per neordinaraj vigleco kaj vivemo. "Mi, al vi mi rakontos kiel okazis al mi io, kio al vi neniam okazis, kaj kio estas iom pli interesa ol via teatro kaj viaj nuboj. — Antaŭ kelke da tagoj, miaj gepatroj min kondukis kun si dum vojaĝo kaj, ĉar en la gastejo kie ni haltis ne estis sufiĉe da litoj por ni ĉiuj, estis decidite ke mi dormos en la sama lito kun mia vartistino" — li altiris siajn kamaradojn proksime al si, kaj parolis per voĉo pli mallauĉa — "Nu, tio strange efikas, kuŝi ne sola kaj esti en la sama lito kun sia vartistino, en la obskuro. Ne dormante mi amuziĝis, dum ŝi dormis, pasigante mian

Originalo:

**Charles Baudelaire
(1821-1867)**

manon sur ŝiaj brakoj, sur ŝia kolo kaj sur ŝiaj ŝultroj. Ŝi havas la brakojn kaj la kolon multe pli dikaj ol ĉiuj aliaj virinoj, kaj la haŭto tie estas tiel milda, ke ŝajnas kiel se estus silkopapero. De tio mi tiel plezuriĝis, ke mi estus longtempe daŭriginta, se mi ne estus timanta, ŝin veki unue, kaj ankaŭ timanta mi ne scias kion. Poste mi enŝovis mian kapon en ŝiajn harojn kiuj pendis al sur ŝia dorso, densaj kiel besthararo, kaj ili ja tiel bonodoris kiel la floroj de l' ĝardeno, je tiu ĉi horo. Provu, kiam vi povos, fari same kiel mi kaj vi konstatos!"

La juna farinto de tiu eksterordinara malkaŝo havis dum sia rakonto la okulojn ege apertitajn pro mirego de tio, kion li ankoraŭ sentis, kaj la radioj de la foriĝanta suno, glitante tra la flavruĝaj bukloj de lia dishirta hararo, tie ekbruligis kvazaŭ sulfurecan aŭreolon de pasio. Estis facile diveni, ke tiu ĉi ne forperdos sian vivon serĉante la Diaĵon en la nubaro, kaj ke li ĝin trovos ofte alie.

Fine, la kvara diris: "Vi scias, ke mi ne multe amuziĝas hejme: oni neniam kondukas min al teatro, mia kuratoro estas tro avara; Dio sin ne okupas pri mi kaj pri mia enuo, kaj mi ne havas belan vartistinon por min dorloti. Ofte ŝajnas al mi, ke mia plezuro estus iri ĉiam rekte antaŭen, ne sciante kien, neniu prizorgante ĝin, kaj vidi ĉiam novajn landojn. Mi neniam sentas min bonfarta kie ajn, kaj mi ĉiam kredas ke mi estus pli bone aliloke. Nu! mi vidis ĉe la lasta foiro de la apuda vilaĝo tri homojn kiuj vivas kiel mi volas vivi. Pri ili ne atentis vi. Ili estis grandaj, preskaŭ nigraj kaj tre fieraj kvankam ĉifonaĵe vestitaj, aspektante kiel homoj ne bezonantaj kiun ajn! Iliaj grandaj okuloj sombraj fariĝis tute brilaj dum ili ludis muzikon; muzikon tiel surprizan, ke ĝi emigas jen danci, jen plori, aŭ fari ambaŭ kune, kaj ke oni fariĝus kvazaŭ freneza se oni aŭskultus ilin tro longe. La unu, trenante sian arĉon sur sian violonon, ŝajnis rakonti ĉagrenon, kaj la alia, saltetigante sian marteleton sur la kordoj de pianeto pendanta je lia kolo per rimeno, mienis kvazaŭ li mokus pri la plendado de sia najbaro, dum la tria kunfrapis de tempo al tempo siajn cimbalojn kun eksterordinara forto. Ili estis tiel kontentaj pri si mem, ke ili daŭre pluludis sian sovaĝulan muzikon eĉ post kiam la homamaso

(daŭrigo p. 113)

Traduko:

Paul Lobut

En sia interesa artikolo "William Shakespeare, el Stratford", H.R. Tonkin skribas: "...la dramoj de Shakespeare devis atendi ĝis la kvindekaj jaroj por la unuaj efikaj tradukoj en Esperanton". Generale tio estas fakto; tamen mi deziras defendi la tradukon "La Venecia Komercesto" de Wackrill (Londono, 1914). Ĝi estas flua kaj preciza, eĉ foje leviĝas super la nivelo de versigita prozo, kaj laŭ mia opinio meritis represon eĉ hodiaŭ, eĉ post la belega "Otelo" de Rossetti, eventuale kun minimuma aldona komentario. Ateste mi aldonas la plej konatan parolon en la dramo (IV, 1), tiun faman de Portia.

La Wackrill-traduko havas ankaŭ la kvaliton, ke prezentite ĝi estus flue komprenebla kaj sekvebla.

Laŭ mia malpli aktuala memoro, ankaŭ la traduko "Songo de Someromeza Nokto" de Louise Briggs (Londono, 1921) ne estas tute senmerita.

Ni ne perdu en ĝeneralaĵoj la malnovajn akiraĵojn (se vere valorajn) de nia kulturo.

William Auld

*Kompato estas virto nedevisa;
ĝi gutas pluve, dolĉe, el ĉielo
sur suban lokon. Per duobla beno
ĝi benas: ĉe donado, ĉe ricevo.
Ĝi plej potencas kun la potenculo;
ĝi pli ol krono reĝon ornamadas.
La reĝa sceptro mondan povon montras,
simbolas respektigon, majestecon,
sidejon de la timosent' al reĝoj;
sed la kompato sidas super sceptroj;
ĝi tronas en la koro mem de reĝoj;
ĝi estas eco de la Plejpotenca;
kaj monda povo plej similas Dian,
se kompatemo spicas la justecon.
Do vi, Hebreo, kvankam vi postulas
justaĵon leĝan, konsideru bone,
ke, laŭ justeco, Dian senkulpigon
neniu el ni trafus. Ĉu ne ĉiuj
ni preĝas por kompato? Tiaj preĝoj
kompaton devus al ni mem instrui.*

Pri tradukmaŝinoj

La tradukmaŝino kaj la Internacia Lingvo bezonas unu la alian. Ili helpas unu la alian al la efektiviĝo.

La konstruado de tradukmaŝino bezonas peradan lingvon racionalan. Estas probable, ke ne eblos fari tian maŝinon, kiu povus traduki senpere el unu nacilingvo en alian. Estos pli facile maŝintraduki unue el nacilingvo en racionalan lingvon kaj poste el ĝi ree en alian nacilingvon.

Se tio estos tiel, la Internacia Lingvo kiel la perada lingvo de la tradukmaŝinoj ricevos kopiaĵon el ĉio, kio estas tradukata per maŝino el iu ajn nacia lingvo en alian. La kvanto de la kopia literaturo peradlingva kreskos plu kaj plu, ĝis tio estos tiel granda, ke neniun individuan nacian lingvon povos havi tradukliteraturan ega-

lecon kun ĝi, ĉar oni en neniun individuan lingvon nacian tradukas ĉion, kio ĝenerale estas tradukata el iu nacilingvo en alian. Krom tio la peradlingva tradukaĵo estos malpli kosta, ĉar ĝi naskiĝas kiel kromproduktaĵo neevitebla en la maŝintradukado pagita de koncernaj nacilingvaj iniciatintoj. Tio donos al la tradukliteraturo de la Internacia Lingvo kvantan kaj komercan superecon.

Por povi tute plenumi sian taskon, la Internacia Lingvo devus havi en si preskaŭ la tutan literaturon de la mondo. Sed ties kvanto estas tro granda por traduki en la Internacian Lingvon per homaj fortoj. Tio eblos nur per tradukmaŝinoj. La Internacia Lingvo kaj la aŭtomata tradukado havas kunligitan sorton.

Emil Hanhineniemi (Aŭstralio)

disiĝis. Fine, ili levis siajn monerojn, ŝargis sian pakadon surdorsen kaj foriris. Volante scii kie ili loĝas, mi sekvis ilin de malproksime, ĝis la bordo de l' arbaro, kie nur tiam mi komprenis ke ili loĝas nenie.

Unu diris: — Ĉu ni disetendos la tendon?

— Nu! ne! respondis la alia, la nokto tiel belas....

La tria diris, kalkulante la enspezon: — Tiuj homoj ne sentas la muzikon, kaj ties inoj dancas urse. Feliĉe, post unu monato ni estos en Aŭstrio, kie ni trovos popolon pli afablan.

— Ni eble preferinde iros al Hispanlando, ĉar jam la sezono alproksimiĝas; ni fuĝu pro la pluvoj kaj ni malsekigu nur nian gorgon, diris unu el ambaŭ aliaj.

Mi ĉion memoras, kiel vi konstatas. Poste ĉiu trinkis tason da brando, kaj ili ekdormis, turninte la frunton al la steloj. Unue mi

deziris peti ilin, ke ili forkonduku min kun si kaj lernigu min ludi per siaj instrumentoj; sed mi ne kuraĝis, sendube ĉar estas ĉiam tre malfacile decidiĝi pri kio ajn, kaj ankaŭ ĉar mi timis esti rekaptita antaŭ ol mi estos elirinta el Franclando."

La mieno malmulte interesiĝa de l' tri aliaj kamaradoj pensigis min, ke tiu etulo jam estas nekomprenebla. Mi rigardis lin atente; kuŝis en lia okulo kaj en lia frunto tio nekonata frufatala, kio plejofte forigas la simpatian, kaj kio, mi ne scias kial, vekis la mian tiagrade, ke mi ekhavis la strangetan ideon, ke eble havas mi fraton de mi mem nekonatan.

La suno malaperis. La nokto solena alvenis. La infanoj disiĝis, ĉiu iranta, nescie, laŭ la cirkonstancoj kaj la hazardoj, maturigi sian destinion, skandali siajn proksimulojn kaj graviti al la gloro aŭ al la malhonoro.

la emoj
(daŭrigo)

Pekoj de l'infaneco, novelo de Bolesław PRUS. El la pola Antoni GRABOWSKI. Eld. Pola Esperanto-Asocio, Kraków, 1963. 60 p. 21 × 15 cm. Dua eld. 3100 ekz. Prezo: 1,25 gld.*

Prus apartenas, kun Sienkiewicz, al la pola pozitivisma skolo de la fino de la deknaŭa jarcento. Li klarvide pritraktas sociajn problemojn kaj trafe pentras personojn, kun humuro kiu pensigas al Dickens.

Ciujn ĉi ecojn de la aŭtoro oni jam trovas en tiu ĉi ĉarma frua lia novelo.

La agojn de la naiva sed bonkora Kazjo, dekdujara filo de la bienintendanto, li rakontas kun vere Dickens'aj humuro kaj sentimento. Oni ridetas pri tiu pedanta "duaklasano" kaj samtempe oni ne povas ne ami lin.

Kaj la juna amo de Kazjo al "Sinjorino" Lonjo, la samaĝa filineto de la bienposedantino, havigas al la aŭtoro la okazon ne nur humore priskribi la sklaviĝon de amanta viro kaj la ruzon "kiu estas la karakteriza eco de la virina logiko", sed ankaŭ trafe konigi la rilatojn inter la tiamaj klasoj. Dum Kazjo estas humila amanto, en Lonjo oni jam klare vidas la superan bienmastrinon kiu primokas la amon de subulo. Sama kontrasto ankaŭ inter la patro de Kazjo, kiu malgraŭ sia bombasta

titolo de plenrajtigito estas nur respektplena kaj kurbiĝema servisto de la bienposedantino, kaj tiu ĉi pseŭdografino kiu, kvankam digne, tamen de alte traktas lin.

Ankaŭ ĉiuj aliaj personoj en tiu ĉi verko "vivas". Oni neniam forgesos la solecan kaj primokatan ĝibuleton Juzjo kaj lian alkoholistan patron, nek la mizeran Valĉjon kiu "neniam havis patron" kaj lian sakrantan kaj turmentantan patrinon.

Kiel en ĉiuj verkoj de Prus la stilo estas sobra sed pro tio ne malpli poezia. Ne mankas ankaŭ naturpriskriboj. La erarvago en la arbaro pensigas al la timtremiga dezerteco de la Litoviaj arbaroj de Mickiewicz.

Sciante ke la tradukon faris Antoni Grabowski, la "patro de la esperanta poezio", oni ankaŭ scias ke ĝi estas modela traduko... en la Esperanton de 1913. Tio signifas ke la lingvo ŝajnas hodiaŭ iom malriĉa. Sed tio signifas ankaŭ ke ĝi estas simpla kaj facile, flue kaj agrable legebla.

Estas evidente ke la tradukinto hezitis pri la akuzativo de direkto, kiun li alterne uzas kaj ne uzas. Saman heziton oni konstatas pri la uzado de la prepozicioj.

Hector Boffejon (Brasschaat)

Distra koktelo por vojaĝantoj kaj aliaj. Eld. Aŭstria Esperanto-Junularo, Vieno, 1964. 128 p., 14 × 10 cm. Ofsetita antologieto rikoltita el diversaj Esperanto-revuo. Prezo: 3,— gld.*

La recepton de koktelo oni ne rakontas al ĉiu ajn. Ĝi estas sekreto. Sed gustuminte, oni konjektas. Ankaŭ pri la recepto de "Distra Koktelo". Ekzemple: Prenu 13 malnovajn diversajn Esperanto-gazetojn. Foliumu kaj trastreku ĉion kion vi opinias malaktualiginta, longa, peza kaj oscediga. La cetereton eltondu kaj gluu sur blankajn paĝojn por fotokopiado.

Povas okazi, ke via tondilo foje distrite glitas distra-mis-tra. Tiam iu rakonto estos sen piedo, kiel sur paĝo 69. Se vi estas ruza, vi vicigos ĝin enhavotabele sub "enigmoj". Vi povas ankaŭ ignori la kriplajn; tiam vi atingos precize "Distran Koktelon", ja sufiĉe amuzan por ke oni ne tro atentu malgravajn beleco-mankojn.

W. Schmid (Rotterdam)

La fundamenta prononco de Esperanto (A.B.C. de Esperanto) de Tacuo HUGIMOTO. Eld. Amo-Akademio, Japanujo, 1963. Disko 17,5 cm. diam., 33,3 r/m. Prezo: 1,50 gld. (6 st.).*

Disko instrucela: po kvar ĝis ses vortoj ekzempligas la sonojn de la Esperantaj literoj (alfabete ordigitaj), ankaŭ konversacieto. Aldonita teksto japanlingva donas klarigojn. Ĝenerale bona prononcmodelo, kvankam u (neronda), ŝ, ĵ (kiel polaj ś, ź), kaj 'maŝinpafila' ritmo ebligas al mi rekoni la parolanton japano. Mankas bezonataj komparoj pri (i) intervokalaj konsonantoj, (ii) intermiksiĝemaj serioj kiel ti - ci - ĉi.

J. C. Wells (Londono)

Elementaire Esperanto Cursus, de ArnHEMA Esp-Kunlaborkomitato. Eld. "Arnhemse Koe-rier", Arnhem, 1964. 63 p., 20,5 × 15 cm. Prezo: 3,50 gld. Kurso por nederlandlingvanoj.*

Unu el la metodoj por instrui Esperanton estas gazetkurso. Ĉi tiu libro enhavas la lecionojn de tiu kurso el Arnhem, Nederlando. Ĝi enhavas en tre konciza formo la gramatikon Esperantan, sed ĉie, malgraŭ la koncizeco, klare eksplikita. Tial la libro estas taŭga por konatiĝi kun Esperanto. Post ĝi la lernanto certe bezonas kaj eĉ ŝatas trastudi pli ampleksan studlibron por grandigi la akiritan lingvan konon. Aprezinde estas, ke oni enmetis ankaŭ novaĵojn pri Esperanto, ĝiaj uzo kaj movado. Por Nederlandanoj certe rekomendinda elementa studlibro.

H. M. Schippers (Utrecht)

Apologiistoj de novkoloniismo, Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1964. 37 p., 18 × 13 cm. Prezo: 0,40 gld.*

Resumo: Tiu ĉi artikolo de 22 okt. 1963 diskutas la gradon de liberiĝo el koloniismo en la landoj de Azio, Afriko kaj Latinameriko, kaj la danĝeron de "nov-koloniismo". Ĝi kritikas la sovetan sintenon al naciliberigaj militoj.

Leo Tolstoj kaj la montprediko, de H. van OYEN. Eld. Kvakera E-ista Societo, Anglujo, 1964. 13 p. 20 × 12 cm., mult. Prezo: 0,50 gld.*

Resumo: Prof. van Oyen kontrastigas ekleziajn interpretojn de la Nova Testamento kun tiu de Tolstoj, kiu rigardis nereziston, neperforton kaj abolon de polico kaj juĝejoj kiel la esencajn instruojn de Kristo.

Cu Jugoslavio estas socialisma lando? Fremd-lingva Eldonejo, Pekino, 1964. 47 p., 18 × 13 cm. Prezo: 0,55 gld.*

Resumo: Jen la ĉina respondo de 26 sept. 1963 al soveta aserto, ke Jugoslavio estas socialisma lando. Post pritakto de la rolo de privata kapitalo en la jugoslaviaj industrio kaj agrokulturo, de rilatoj kun Usono, k.a., la verkintoj konkludas, ke kapitalismo estas restarigata en Jugoslavio.

RICEVITAJ ELDONAĴOJ

Sen paraŝuto, poemaro orig. kaj trad. de Poul THORSEN. Eld. Stafeto, La Laguna, 1963. Beletraj kajeroj n-ro 20. 143 p. 18 × 12 cm. Prezo: 4,50 gld. (18 stelojn).*

Sub stelo rigida, poemaro de Thorsteinn frá HAMRI. El la islanda trad. Baldur RAGNARSSON. Eld. Stafeto, La Laguna, 1963. Beletraj kajeroj n-ro 21. 131 p., 18 × 12 cm. Prezo: 4,50 gld. (18 st).*

Bela konvolvulo. Eld. Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino 1964. 20 p., 20 × 18 cm. Kolorpresita infanlibreto. Prezo: 0,40 gld. (1,60 st).*

Klopodo de simioj por elakvigi la lunon. Eld. Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, 1964. 12 p., 25 × 21 cm. Kolorpresita infanlibreto. Prezo: 0,80 gld. (3,2 st).*

Esperanta-sinhala vortareto, de V. SADLER. Eld. UEA, Kolombo, 1964. 28 p., 18 × 12 cm. 2000 ekz. Prezo: 0,50 gld. (2 st).*

Kronach, la mezepoka urbo. Eld. Städtisches Verkehrsamt, 864 Kronach, Germanujo. Senpaga turisma faldfolio.

Tajĝiĉĵuan, speco de ĉina korpoekzerco. Eld. Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, 1964. 48 p., 18 × 13 cm., il.

Wiener Neustadt. Kvinlingva (ink. Esp.) nova turisma prospekto koloril. Senpage liveras: G. Schmid, Wiener Neustadt, Wöllersdorferstr. 25-II-6, Aŭstrujo.

Terminaro pri la kovrado de metaloj, angla-Esp., Esp.-angla, 10 p., 28 × 22 cm;

Galvanizado de bismuto sur ŝtalon el alkalaj elektrolitoj, 5 p., 28 × 22 cm.;

Taksado pri modifita fericianida provo kiel indikilo pri la poraro en stanita ferlado, 11 p., 29 × 11 cm.;

Metodo pri la produktiĝo de bel-aspektaj brunaj oksidaj kovraĵoj sur ŝtalo, 22 p., 30 × 22 cm.; ĉiuj de J. A. McCarthy, UEA-del. en Monroeville, Usono; multobligitaj.

La akupunkturo kaj kaŭterizo de Ĉinio. Eld. Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, 1964. 16 p., 18 × 13 cm, plus 4 fotopaĝoj.

Lioux. Il. turisma prospekto. Liveras: "Le Clos Fleuri", Lioux (Vaucluse), Francujo.

Bridlington, turisma faldfolio havebla de Dept. A, Information Bureau, Bridlington, Yorks., Anglujo.

La bela Ĝuang-brokato de GI Ĝihi, elĉinigis ZEKUN. Eld. Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, 1963. 60 p. 13 × 18 cm. Kolorpresita bildrakonto. Prezo: 0,95 gld. (3,8 st).*

Ĉiu Esperantisto ĝuos ĉi tiun belan bildrakonton el Ĉinujo. La koloraj bildoj estas vere belegaj kaj tre helpas klarigi la fabelon al komencantoj kaj infanoj, kiuj ne multe scias Esperanton. Bedaŭrinde la tradukisto ne uzis la plej simplan lingvon taŭgan por infanoj kaj komencantoj. Tamen tiaj rakontoj estas treege bezonataj, kaj espereble iam iu eldonos infangazeton kun tiaj bildoj.

P. Buttinger (Londono)

PREMIO "COMELLA-BASSOLS" SESA KONKURSO

Oni donacos 2.000 pesetojn (400 st.) por la plej bona gaja rakonto en Esperanto.

Ĝeneralaj reguloj

- 1a — La konkursaĵoj havu la amplekson de po 2000-3000 vortoj.
- 2a — La konkursaĵoj nepre estu maŝinskribitaj, kaj oni sendu 4 ekzemplerojn.
- 3a — Oni skribu sur ĉiu rakonto pseŭdonimon por kaŝi la identecon de l' aŭtoro, kaj — en aparta koverto — sian nomon kaj adreson kune kun la pseŭdonimo.
- 4a — La Juĝanta Komisiono, laŭ testamento de S-ro Jacint Comella (kreinto de la Premio) konsistas el eksterlandaj membroj de U.E.A. kune kun katalunaj juĝantoj.
- 5a — La konkursa kotizo, por unu aŭ pluraj rakontoj, estas 10 pesetoj por Hispanujo, kaj 4 steloj por eksterlando, (aŭ 3 respondkuponoj). Por landoj kie ne estas eble sendi la kotizon, la partopreno estas senpaga.
- 6a — Kiam publikiĝos la Verdikto, samtempe estos sciigita la koncerna Juĝantaro.
- 7a — La limdato por la ricevo de konkursaĵoj estas la 31a de aŭgusto 1964.

Oni sendu ĉion laŭ la jena rekomendo: Por la Konkurso COMELLA-BASSOLS S-ro Francesc Vilà — Sekretario. Instituto de Esperanto, Strato Montcada, 12 BARCELONA (3) Hispanujo.

GERVAIS RANDRIANASOLO

Antaŭnelonge mortis S-ro G. Randrianasolo, 57-jara, siatempe ministro en la madagaskara registaro, honora prezidinto de la Madagaskara Esperanto-Asocio, plurjara membro de UEA.

KAV. GIUSEPPE ZACCONI (1893-1964)

La 16-an de marto forpasis 70-jara la Prezidinto de la Itala Fervojista Esperanto-Asocio, Giuseppe Zacconi. Li estis Vic-Delegito de UEA en Bologna ekde 1951 kaj organizinto de pluraj kongresoj.

SUZANNE EYMIN

En Foubot, Kameruno, mortis pro akcidento S-ino S. Eymin, tiea Delegitino ekde 1952.

novaj libroj

nekrologoj

esperanto
junio
1964 115

mallongaj
novaĵoj

LAŬLANDE

Argentino

● Radia kurso de Esperanto komenciĝis en marto en la ŝtata radio, filio en Rosario, per kvaronhoro semajne.

Aŭstrujo


● Ekaperis nova internacia revueto de "Enigmo kaj humoro", ofsete eldonata de Aŭstria Esperanto-Junularo, WIEN XV, Fünfhausgasse 16.

Belgujo

● Granda ekspozicio "La mondo postulas pacon" en Antverpeno en oktobro inkluzivos sekcion pri la Internacia Lingvo.

Francujo

● En junulara loĝejo en Chatillon sous Bagneux Esperanton lernas francaj junuloj, kune kun Afrikanoj el Malio, Senegalio, Dahomeo, Togo kaj Algerio, sub gvido de Maliano Ibrahim Tambura.



Instrucentro
en Groningen
— loĝejo de
la geografia
semajno 1964
(vidu p. 95)

Hungarujo

● Revigliĝos la eldonado de esperanta literaturo, dormanta jam de antaŭmilite, se ĝin subtenos la aĉetantoj. Kiel provo aperos en la fino de 1964 nova eldono de la granda eposo "Tragedio de l' homo" de Madách, tradukita de Kolomano Kalocsay.

Islando

● Ĉiumonatan kurson aperigas la plej granda junulara gazeto "La Junularo" (Æskan), kiu ampleksas 11.000 ekz. La kurson apogas la Islanda Radio, per disaŭdigo de Esperanta prononco en junulara programo. Ĉi tiu kaj simila sukceso en Nov-Zelando (p. 33) devus helpi klopodojn en aliaj landoj.

Jugoslavio

● Ĉiu ano (11-15-jara) de la infana grupo "Junaj Ambasadoroj" en Bjelovar elektas unu landon, pri kiu ĝi devas pere de la Internacia Lingvo kiel eble plej multon ekscii por fariĝi ĝia "ambasadoro" en la klubo. La klubo organo jam atingas 62 landojn.

Kanado

● La Kanada Esperanto-Asocio prezentis ĉiujn rezoluciojn de la Beograda Konferenco de Lernejoj al la ĉefministro, la ministroj por edukado, la komisiono pri dukulturismo kaj dulingvismo, k.a. Venis respondoj petantaj i.a. informojn pri la valoro de Esperanto por posta lernado de fremdaj lingvoj. Guste tian dokumenton nun preparas CED.

Nov-Zelando

● S-ino Doris Worcester, kiu jam vojaĝis tra 55 landoj de ĉiuj kontinentoj, inter decembro 1963 kaj marto 1964 faris grandan nombron da prelegoj, intervjuoj, k.a. en Nov-Zelando, i.a. al 600 studentoj de pedagogia kolegio.

Tajlando

● La kompanio Shell konsideras eldoni en Esperanto filmon pri la rivero Mekong, kiu trafluas Ĉinuĵon, Burmon, Laoson, Tajlandon, Kamboĝon kaj Vjetnamion, kaj sur kiu estas projektita kolosa internacia diglaboro. Esperanto-organizaĵoj k.a. skribu apoge al S-ro C. Hart Schaaf, Executive Agent, Mekong Coordination Committee, Bangkok.

LAŬFAKE

Blinduloj

● Brajlrita estas hispanlingva lernolibro "Sabe Ud. Esperanto?" de Prof. Jorge Hess. Brajlis F-ino M. Luisa Romero, Argentino.

Fervojistoj

● La Eŭropa Horarkonferenco en Sofio konstatis, "ke — kvankam tio sendube ŝajnas dezirinda — oni ne povas ordoni al la membro-administracioj de la Eŭropa Horarkonferenco la lingvojn, en kiuj estas presendaj la Ĝeneralaj Rimarkigoj en la naciaj horaroj. Pro tio estas decidite lasi al ĉiu administracio, presigi la Ĝeneralajn Rimarkigojn en fremdaj lingvoj iuj ajn kiel ankaŭ en Esperanto".

Instruistoj

● Fondiĝis jam la sepa lerneja rondo de "Grajnoj en Vento", la valora organizo de lernejoj Esperanto-klasoj. Interligitaj estas nun 70 klasoj en 20 landoj de 4 kontinentoj. Pri "Grajnoj en Vento" elsendis en marto la japana televido.

Komerco

● La Instituto por Esperanto en Komerco kaj Industrio (EKI), Aalsterweg 217, Eindhoven, Nederlando, urĝe petas ĉiujn, kiuj okupiĝas pri komerca terminologio en Esperanto, kontakti kun ĝi por eviti duoblan laboron.

Literaturo

● En la kadro de la 25-a Hispana Esperanto-Kongreso okazos literatura konkurso kun branĉoj: originala poezio (maks. 40 versoj), traduka poezio ("A las flores" de Calderón), originala prozo (hispana temo, maks. 2500 vortoj) kaj originala prozo kun libera temo (maks. 2500 v.). Informas: HEF, P^o Marina Moreno 35, 4^o dcha, Zaragoza. Limdato: 21 junio 1964.

● La konkurso "Luis Hernández" (vidu "Esp." 1962/180) gajnis novelo de Gabriel Mora Arana, Manresa, Hispanujo. La duan premion gajnis Salvador Gumá.

Religio

● La 30-a internacia kongreso de IKUE (Valencio, 23-29 julio) pritraktos temojn el la papa encikliko "La surtera paco". Informas IKUE, 36 rue Etat Tiers, Liège.

MEMORIGA KALENDARO

Junio

- 26-28 Kanada Kongreso en Ottawa
30 Limdato aliĝo 49-a U.K. Hago

Julio

- 1 Limdato foto-konkurso (p. 34)
2 Sezono Grésillon komenciĝas (p. 100)
3-5 Usona Kongreso en Nov-Jorko
5-8 Tria Somera Universitato, Gyula, Hung.
5-9 Jugoslavia Kongreso, Rijeka, Kroatio
9-20 Int. Junulara Kunveno, Balaton, Hung.
11-13 Bulgara Kongreso en Pleven
11-14 Ĝen. Kunveno de INOE, St. Chéron.
12-26 Int. Jun. Tendaro, Ciechocinek, Poll.
16-22 Int. Seminario Bulg. E. J., Primorsko
19-26 Int. Feriaj Kursoj, Helsingør, Danl.
21-24 Hispana Kongreso en Valencia
23-29 IKUE-Kongreso en Valencia
25-31 Kvina Geografia Semajno, Groningen
SAT-Kongreso en Narbonne
25-1/8 KELI-Kongreso, Lunteren, Nederl.
30-1/8 Antaŭkongreso en Bruselo (p. 216)

Aŭgusto

- 1 UK-kotizoj por Tokio plialtiĝos
1-8 49-a Universala Kongreso, Hago
8-12 Postkongreso en Leeuwarden (p. 216)
9-16 20a IJK de TEJO, Amsterdam (p. 118)
9-17 Int. Ferioj, Krommenie, Ned. (p. 20)
23-29 Eŭropa Feriosemajno apud Lugano

Septembro

- 13 Sezono Grésillon finiĝas
19-26 Itala Kongreso en Sorrento

Oktobro

- 20-17/11 Ĝen. Konf. Unesko, Parizo
24 UNO-Tago

CITAĴOJ

S-ino Louise B. Kornbluth: "Mi permesas al mi proponi al vi miajn servojn kiel interpretistino por via venonta kongreso aŭ konferenco". El afabla letero al UEA.

Paco, n-ro 118: "Mi atendas aŭdi de mutaj samideanoj alilandaj". Paciencon!

El Popola Ĉinio: "Por la studo la verkinto referencis 118 koncernajn verkojn kaj faris multajn eksperimentojn pri 11 specoj da legumenoj. En la traktato troviĝas ankaŭ riĉaj fabeloj kaj diagramoj". Eble devus esti "anagramoj"?

Oficiala dokumentaro de la 5-a Kongreso de UEA (1914): "Per decido de la 30 aprilo kaj 9 junio la supera administracio de la svisaj doganoj decidis, ke membroj de UEA biciklete veturontaj en Svisujon povos pasi la landlimon, sen depono de garantio, nur montrante la membrokarton laŭleĝe atestitan". Supozeble ankoraŭ validas?

Plena Vortaro: "Pigmeo: Ano de mita popolo rimarkinda pro ĝia malgranda kresko". Jen la originala Esperanta mitologio.

Informojn pri radio sendu al S-ro G. Lar-glantier, 29 Bd. Murat, Paris 16, Francujo. Por pliaj detaloj vidu la aprilan numeron.

Radio Praha. 25-VI, Nacia artisto Martin Benka, esperantisto. Nur jaŭde per ondo 233 m. (1286 kcs).

Radio Gdańsk daŭre prezentas ĉiusemajnan esperantlingvan programon de la 8-a de decembro 1960. Raportoj pri aŭskultado, sugestoj, kritikoj, komunikoj estos bonvenaj. Skribu al Pola Radio, Uphagena 1, Gdańsk, Pollando. Neniu ŝanĝo pri tago kaj horo: ĉiun lundon matene de 06.15 ĝis 06.30 per ondo 230 m. (1304 kcs).

Radio Warszawa (Varsovio) atentigas vin pri la sezona ŝanĝo de la uzataj ondlongoj: 200 m. (1502 kcs), 48.90 m. (6135 kcs), 42.11 m. (7125 kcs), 41.99 m. (7145 kcs), 41.27 m. (7270 kcs), 41.18 m. (7285 kcs), 31.50 m. (9525 kcs), 31.45 m. (9540 kcs). Ĉiutage, de 15.30 ĝis 16.30 GMT.

LA POŝTMARKKOLEKTADO

Atentu! Provizora adresŝanĝo ne plu validas! Sendu vian kontribuon al: Peter Zacho, Randbølge 4, Kopenhago F., Danlando.

Pro la adresŝanĝo, la poŝtoŭicejo resendis al eksterlando certan nombron da leteroj. Inter ili sendube estis kelkaj kun poŝtmarkoj. Mi petas pardonon de miaj nekonataj alskribintoj.

GAZETARA KONFERENCO EN HAGO


Post detalaj preparoj okazis la 28-an de aprilo en la Ĵurnalista Centro en Hago la unua gazetara konferenco pri la 49-a UK. Estis senditaj invitaj kartoĵoj al ĉiuj nederlandaj ĵurnaloj kaj agentejoj, kaj la samaj adresoj ricevis aparte la unuan bultenon de la Kongreso kun klarigaj cirkuleroj en la nederlanda lingvo. El la invititoj, 11 ĉefaj ĵurnaloj, inter kiuj troviĝis ankaŭ la grava novaĵ-agentejo ANP, ĉeestis la konferencon.

Enkondukon faris en Esperanto Prof. Lapenna, ĝenerala sekretario de UEA, kiu povis viziti Nederlandon revenante de universitata prelego en Strasburgo. Liajn vortojn tradukis F-ino M. H. Vermaas. Krome, ĉiuj ĉeestintoj ricevis ampleksan, bele prezentitan dokumentaron pri la Kongreso kaj pri la lingvo ĝenerale. La saman dokumentaron ricevis la sekvantan tagon ĉiuj neĉeestintaj invititoj per poŝto.

Rezulte de la konferenco aperis aro da artikoloj, kelkaj sufiĉe ampleksaj, en diversaj ĵurnaloj, kaj la Direktorino de la C.O. estis intervjuita por la nederlanda televido, ĉefe pri la programo de la UK kaj infana kongreseto.

Tuj post la gazetara konferenco okazis en Rotterdam prelego de Prof. Lapenna pri Esperanto en la Lernejoj.

La antaŭan matenon Prof. Lapenna prelegis pri la "Lingvaj malfacilaĵoj en la rilatoj inter la nacioj" al ĉ. 180 studentoj kaj pluraj instruistoj de la porinstruista seminario "Thomas Morus" en Rotterdam.





LA JUNA VIVO

**Oficiala organo de
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
Materialojn por "La Juna Vivo" sendu al
Ivo Osibov, Splitskog odreda 15,
SPLIT, Jugoslavio.**

"KONTAKTO" APERIS

Aperis jam unua regula numero de "Kontaktto" — internacia junulara revuo kun varia kaj interesa enhavo, abunde ilustrita, sur lukspaperaj 16 paĝoj. Jen nur la titoloj de ĝia enhavo: Roland Harari, 5.000.000 da francaj gejunuloj akuzas: "ĉiuj kontraŭas nin"; Drago Kralj, Katastrofoj de la tuta mondo (pri Skopje kaj Longarone); Ken Miner, Alta Kanto; Cicely Tyson — verva dinamo; Donald Broadribb, Saltas ne nur la kanguruoj; Melvin J. Lasky, pri la arto kaj scienco de neŭtraleco.

Se vi estas individua membro de UEA kaj ne havas pli ol 25 jarojn, bonvolu sciigi vian aĝon al la CO kaj vi ricevos senpage la revuon. Ĉiuj aliaj povas ~~aboni~~ la revuon sendante 8 guldenojn al la CO.

POR PASIGI AGRABLAJN FERIOJN

vi sendube deziras iri al iu Esperantista renkonto. Ili estas multaj. Krom la pure Esperantistaj eventoj aŭ ferioj, estas kelkaj renkontoj, ne speciale Esperantistaj, sed en kiuj Esperanto ludas pli malpli gravan rolon. Inter tiuj, ni povas citi la Muelejojn de la Metilernantoj, en Bonat, Creuse, Francujo.

Naskitaj de la cerbo kaj la koro de S-ro Charreille, por ĉiuj "la onĉjo", ili celas doni al gejunuloj aŭ ne-plu-gejunuloj de ĉiuj landoj: metilernantoj, laboristoj, aŭ studentoj aŭ intelektuloj, eblecon pasigi agrablajn nekostajn feriojn. La partoprenantoj laboras kelkajn horojn ĉiutage por ripari malnovajn muelejojn kiuj fariĝas domoj por la ferioj de gejunuloj, kaj ili samtempe ĝuas la gajecon kaj la amikecon de komuna vivo en verda naturo.

En 10 jaroj, 10.000 homoj el 33 landoj ordigis 10 muelejojn, kaj la movado kreskas kaj daŭras. Kiam oni parolas pri 33 landoj, oni pensas pri la problemoj de la lingvoj. "Onĉjo" tuj komprenis ĝin kaj pro tio, li tutkore akceptas la Esperantistojn, kiuj iras al la muelejoj kaj helpas lin Esperantigi ilin.

Vi ankaŭ iros al la Muelejoj por montri en tiu juna kaj internacia medio, ke Esperanto estas realaĵo. Por havi informojn, vi povas vin turni al S-ino Pérez, 42 rue Rouget de l'Isle, Chateauroux, Indre, Francujo, aldonante respondkuponon.

G. Perra

EL LA LANDAJ SEKCIOJ

Francujo — Gejunuloj el Britujo, Belgujo, Nederlando kaj Francujo partoprenis la 3-an markolan kongreson en Calais. Lerneja klubo el Bromley, Britujo, ĉeestis la ĉefajn aranĝojn antaŭ ol veturi per sia propra aŭtobuseto al Parizo kaj Baugé. Alia lerneja karavano sub gvidado de s-ro Norman Williams, lernejestro en Denton, Britujo, trapasis Nordan Francujon survoje al eduka krosado sur la Mediteranea maro. La gazeto "Nord Eclair" detale raportis pri tiuj ĉi "maraj studhoroj". (L. Giloteaux)

Jugoslavio — Post unujara paŭzo ĉijare Jugoslavia Esperantista Junulara Asocio de nove organizos esperantistan junularan laborbrigadon, kiu dum Julio kune kun aliaj brigadoj konstruos Adriatikan aŭtoŝoseon en Montenegro. Inter la 120 gebrigadanoj ĉijare por la unua fojo troviĝos ankaŭ 10 junaj esperantistoj eksterlandaj.

Nederlando — Sekvante la bonan ekzemplon de Germana Esperanto-Junularo en Gilleleje, Danujo, la LKK de la 20-a IJK aranĝos tre verŝajne rapidegkurson de 1-8-a de aŭgusto, do tuj antaŭ la IJK. La kurso, kiu kostos 75 ned. guld. estas destinita por en- kaj eksterlandaj neesperantistaj gejunuloj, kiuj tamen deziras partopreni la Kongreson. Ĝi okazos en junulara hotelo de la "Unuiĝo por Internaciaj Junularaj Kontaktoj" en belega arbata regiono apud Utrecht.

LA LOKA KONGRESA KOMITATO INFORMAS

"Paroli estas arĝento, silenti oro". tiel juĝas Nederlanda proverbo. Por stimuli la produktadon de arĝento (necesa por pliaj pokaloj "Ivo Lapenna") ni anoncas ĉi-pere la temojn de la *Oratora Konkurs*: 1. TEJO dudek kvinjara. 2. La Taglibro de Anne Frank, kiel ĝi al mi impresis. 3. Milito, ĉu solvilo por internaciaj problemoj? 4. Ĉu eniru la lernejojn nova instrutemo: "La Organizaĵo de la Unuiĝintaj Nacioj"? 5. Kion mi ne ŝatas pri Nederlando.

Eble vi pensas, ke oratoranto pro ora torento (de vortoj) estas alĥemiista amatoro. Sed laŭ la proverbo, ĝuste la aŭskultado valoras. Tiun oran virton ekzercigos al vi du altnivelaj oficialaj *Prelegoj*: — "Milito, ĉu solvilo por internaciaj problemoj?" de mag. G. H. Slotemaker de Bruine, parlamentano, prezidanto de la Pacifista Socialista Partio de

Nederlando, ĉefestrarano de la Unuiĝo de Mondfederalistoj; kaj: simpozieto pri Afriko, konsistanta el prelego, diskuto, ekspozicio aranĝataj de la "Centro de Esploroj pri Afriko" de Pola Esp. Junularo, kaj prelego: "La grupo de junaj Nederlandanoj dum la unua jaro 1963-1964 de sia helpkampanjo en Kameruno", de ing. W. H. Dijkstra, ĉefestrarano de la Nederlanda Kristana Unuiĝo de Kamparaj Gejunuloj.

Ni memorigas: La kotizoj estas nun: 85 ned. gld. por ĝis-20-jaruloj, 90 ned. gld. por pli-aĝuloj. Krompago por ne-TEJO-membroj: 5,— ned. gld. Atentu: *la aĝlimo por partopreno estas 25 jaroj*. Ciu kongresano kunportu: littukojn, bankostumon, muzikilojn. Statistikoj je 15 marto 1964: 80 aliĝintoj el 14 landoj.



DELEGITOJ

Aŭstrujo

Graz D: vakas.

FD (Oficistaj aferoj): vakas.

Wels (Ober-Österreich). 42.000.

D: S-ro F. Richter, komerca dungito, Feldgasse 8.

Belgujo

Antwerpen 500.000.

JD: S-ro Ivo Durwael, instruisto, 77 Dolfijnstraat; tel. 03/39.79.82.

Liège

FD (Trinkaj-industrio): S-ro André Coppé, interpretisto, Quai de Rome 76, tel. 526893.

Brazilo

Mendes (Rio de Janeiro). 14.000.

D: S-ro José Vigh, pastro kaj profesoro.

FD (Skoltismo): la D.

Rio de Janeiro (Guanabara). 3.310.000.

FD (Religio-katolikismo): F-ino A. Baggi de Araujo, em. federacia oficistino, Rua Júlio de Castilhos, 61 c/II (Copacabana), tel. 47.5911.

Vitória (Espírito Santo). 90.000.

D: S-ro G. Villas Boas Passos, instruisto, Travessa São Henrique 73, Vila Rubim (térreo).

FD (Psikodiagnozo Miokinetika): la D.

Britujo

Darwen D: vakas.

Harlow (Essex). 75.000.

JD: S-ro J. Hamilton, instruisto, 16 Woodleys.

FD (Edukado): la D.

Stoke-on-Trent (Staffordshire). 280.000.

VD: S-ro J. Baggaley, instruisto, "Cortina" Common Lane, Rough Close; tel. Blythe Bridge 2310.

Bulgarujo

Cef-Delegito: S-ro K. Vâlev, redaktoro en libroeldonejo, Sofio 27, str. Čatalga 5; tel. 4-34-51.

Kolarovgrad 70.000.

VD: S-ro A. I. Dočev, elektro-radioteknikisto, str. Prezviter Grigori 6, tel. 33-73.

FD (elektro- k. radiotekniko): la VD.

FD (filatelo): S-ro Č. G. Karaspasov, fakestro en poŝtejo, strato "Malčika" 12, tel. 18-82.

Peŝtera (Suda Bulgarujo). 15.000.

D: S-ro Š. Z. Kukuŝev, agronomo, str. "Obo-riŝte" 15.

Sofio 800.000.

D: S-ro V. Oljanov, ĵurnalisto, str. Ivan Vazov 17, tel. 8-22-90.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Mabesoone, Prof. D-ro J. M., Recife, Brazilo;
Savir, S-ro M., Bamako, Malio;
Scheffler, S-ro Hermann, Oberhausen, Germ.;
Strgacić, S-ro Dominik, London, Britujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1964

305. Farias, S-ro Benedito Fig., 306. Freitas, S-ro A. Wantuil de, Brazilo; 307. Pedersen, S-ro J., Danlando; 308. Teukku, S-ro T., Finnlando; 309. Dalier, S-ro H., 310. Epstein, S-ro

Ĉeĥoslovakio

Jihlava FD (Filatelo): vakas.

Finnlando

Jokela D: vakas.

JD: vakas.

FD (Religio ortodoksa): vakas.

Lammi (Hämeen lääni) D: vakas.

Paimio D: vakas.

Ruovesi D: vakas.

Francujo

Beaune D: vakas.

Germanujo

München FD (Sporto-alpinismo): vakas.

Neu-Isenburg D: vakas.

Regensburg FD (Junularo): vakas.

FD (Religio kat.): vakas.

Walsdorf/Taunus FD (junularo): vakas.

Hispanujo

Mirafior-Vergel D: vakas.

Israelo

Tel Aviv FD (Konstruado): vakas.

Japanujo

Tokio FD (Japana lingvo): vakas.

Meksiko

Puebla D: vakas.

Norvegujo

Lillestrøm FD (Instruado): vakas.

Pollando

Gdańsk-Orunia D: vakas.

Sovetunio

Rostov-Don 700.000.

FD (Telefonio): S-ro A. Vasin, telefonia inĝeniero, Semaŝko 46 kv 1, tel. 6.05.73.

Viljandi (Estonio). 20.000.

VD: S-ro S. Tulve, sanitaristo, Edela 5.

Svedujo

Malmö 238.000.

FD (Gimnastiko Jogo): S-ino Asta Schaedel, Rönneholmsvägen 42 b; tel. 916309.

Urugvajo

Montevideo 1.000.000.

FD (Bankaj aferoj): S-ro A. Benko, bank-oficisto-komerca reprezentado, Calle Espinillo 1254, tel. 20-47-05.

Usono

Ann Arbor (Michigan). 75.000.

D: S-ro R. Riley, studento de radiobiologio, 1438 Washington Heights, Michigan 48104; tel. 313.66.55986.

FD (Radiobiologio): la D.

San Diego (California). 600.000.

VD: S-ro R. N. Morgan, ĵuĝeja ataŝeo, 1961 Cardigan Way, San Diego 92111; tel. 227-2780.

Norbert, Francujo; 311. Klunder, S-ro Willi, 312. Oeste, S-ro Wilhelm Th., 313. Schumacher, S-ro F., 314. Wingen, S-ro Wilhelm, Germanujo; 315. Engen, S-ro Per, Norvegujo; 316. Hardick, S-ro N., Sudafriko; 317. Colliander, S-ino M., 318. Ekman, S-ro K. G. A., 319. Enström, F-ino M. L., 320. Ericson, S-ro Å., 321. Hakansson, S-ro Hugo, 322. Hertzman, S-ro Anders, 323. Johnsson, S-ino M., 324. Josefson, S-ino Ingrid, 325. Nilsson, S-ro Teodor, 326. Sedendahl, S-ro B., 327. Stenberg, S-ro Bengt, Svedujo; 328. Baur, D-ro A., Svislando.

oficiala
informilo
n-ro 369
1 majo 1964

aligu
la
kurs
fin
intojn
al
Espe
ranto-
organ
izaĵoj
(labor
plano
III
A 7 d)

esperanto
junio
1964 119

DONACIOJ ĜENERALA KASO

Milton, S-ro R. J., Helsinko: 55,— gld.
Scheffler, S-ro Hermann, Oberhausen: 18,— gld.
Schumacher, S-ro Fritz, Karlsruhe: 8,10 gld.
Salzmann, S-ro K. E., Frankenberg: 0,54 gld.

FONDAJO "VASTIGO DE LA AGADO"

Martin Gómez, S-ro M., Madrid: 9,90 gld.
Entute: 13.949,47 gld.

FONDAJO CANUTO

Tumi, S-ro Niko, Finnlando: 1 MA.

GRAVA ATENTIGO

Pluraj oficistoj de la Centra Oficejo forestos dum la fino de julio kaj unua duono de aŭgusto pro la Kongreso en Hago kaj pro libertempoj. Pro tio bv. prefere ne skribi al la Centra Oficejo dum la menciita periodo. Dankon!

ANONCETOJ

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins, Clermont-Fd. (PdD) Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Informojn pri la katolika religio oni povas senpage ricevi de la Internacia Katolika Informejo, Sekretariejo: Gasthuisring 54, Tilburg, Nederlando.

Ni deziras turismajn kaj aliajn esperantaĵojn por ekspozicio dum la Kanada Kongreso de Esperanto, 26-6-1964. Adreso: 68 McNaughton Avenue, Ottawa 1, Kanado.

Ĉu la tera homo havas liberan volon? Tiu artikolo prilumas la interesan demandon, en kioma grado la homo mem povas influi sian sorton. Inter aliaj artikoloj ĝi troviĝas en **informilo**, 24-paĝa ilustrita kajero kun 4-kolora bela kovrilo, kies prezo estas 4 int. rspk.... Petu senpagan ilustritan faldprospekton ĉe Martinus Instituto, Mariendalsvej 94-96, Kopenhago F., Danlando.

32-jara fraŭlo deziras edzinigi entuziasman fraŭlinon. Ladislao Molnár, Székesfehérvár Árpádfürdő, Hungarujo.

Mia junulo volas fariĝi filatelisto. Kiu povus ĝojigi lin per uzitaj poŝtmarkoj? Hans Aberle-Mayr, Innsbruck, Arzl 251 (Aŭstrujo).

F-ino Concepción Casado, Gral. Ricardos 226, Madrid 19, Hispanujo korespondas bildkarte kĉl.

Brazilanaj Gelernantoj deziras ekkorespondi kun tuta mondo per belaj kaj ilustritaj poŝtkartoj. Adresoj: Ginásio Lara Vilela, Travessa Manuel Continente, Niterói, Brazilo. Ginásio Nossa Senhora Aparecida, Santo Eduardo, Campos, RJ., Brazilo.

Okaze de kursfino por gekomencantoj fine de junio ni aranĝos letervesperon. Ni petas afable pri multaj salutoj. Respondoj garantiataj. Esperanto-Studrondo, 6430 Bad Hersfeld, Unter der Stiegel 27, Germanujo.

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1964

stato je la 30-a de aprilo

Konkurso I

Lando	kvoto	poentoj	%
1. Britujo	6691	5465	81.68
2. Nederlando	5975	4855	81.26
3. Hispanujo	2660	2130	80.08
4. Francujo	7752	5998	77.37
5. Italujo	4210	3225	76.60
6. Brazilo	3694	2526	68.38
7. Svedujo	7180	4810	66.99
8. Finnlando	3160	2055	65.03
9. Svislando	2459	1540	62.63
10. Usono	4526	2775	61.31
11. Belgujo	2055	1200	58.39
12. Danlando	3099	1760	56.79
13. Germanujo	7141	3920	54.89
14. Norvegujo	1755	900	51.28
15. Japanujo	3690	1885	51.08
16. Jugoslavio	5375	1515	28.19

Konkurso II

1. Aŭstralio	1475	1183	80.20
2. Islando	250	195	78.—
3. Aŭstrujo	1430	1055	73.78
4. Portugalujo	485	325	67.01
5. Kanado	842	520	61.76
6. Madagaskaro	250	135	54.—
7. Sudafriko	250	125	50.—
8. Nov-Zelando	1481	685	46.25
9. Israelo	460	205	44.57
10. Argentino	810	310	38.27
11. Urugvajo	250	75	30.—

Vidu la regulojn sur paĝo 38.

Sveda libroamanto kaj amatora botanikisto deziras seriozan korespondadon kaj interŝanĝadon de libroj, ideoj kaj objektoj. Pri libroj estas kontakto dezirinda precipe kun angla-lingvaj landoj inkluzive Usono; rilate al botaniko volonte kun amatoroj el cetera mondo. Afable skribu al s-ro Arvid Pettersson, Karlslundsgatan 6, Skövde, Svedujo. (Represo dezirata).

Esperantista Vegetaranino deziras luigi dormoĉambron kun pitoreska panoramo de Malaga. Sinjorino Vecchio-Blogue 12, 7A, Las Flores, Malaga, Hispanujo.

Prof. Aderaldo Rocha deziras korespondadon pri lingvoj kaj parapsikologio kun ĉiuj nacioj. Rua Belo Horizonte 133, Itabuna, Bahia, Brazilo.

Por montri al la loĝantaro en Windsor kiel disvastigita estas nia lingvo, bonvolu sendi bildkartojn al S-ro M. S. Bale, 79 Grove Road, Windsor, Berkshire, Anglujo.

La Kultura Zamenhof-Centro en Les Andelys (Francujo) aranĝos filatelan laŭteman ekspozicion la 28-an de junio posttagmeze, okaze de la disdono de la premioj al la Esperanto-gelernantoj. Multnombra vizitado kaj salutkartoj estos same bonvenaj.

"La Marvirineto" de H. C. Andersen ankoraŭ havebla ĉe UEA aŭ rekte ĉe eldonejo KOKO, Kolby Kaas, Danlando. Prezo 30 st.

Lastaj informoj



Foto-konkurso Gevaert

Rapidu sendi viajn fotojn antaŭ la limdato: 1 julio 1964! Ĉiuj konkursaĵoj estu senditaj al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. La temo — "Freneze mi amas la naturon, ĉu nur pro tio, ke dum longa tempo mi ne povis elŝovi la nazon eksteron?" — ebligas grandan diversecon de realigoj. La valoraj premioj: premio Gevaert, 400,— gld. plus bela medalo; 1-a premio, 150,— gld.; 2-a premio, 100,— gld.; 3-a premio, 50,— gld. Krome, la plej bona fotisto malpli ol 26-jara gajnos ekstran premion Gevaert: 200,— gld. plus medalo!

Por ĉiuj aliaj instrukcioj kaj kondiĉoj de partopreno, vidu paĝon 34 de la februara "Esperanto", kaj la enmetitan folion en la maja eldono.

Ekskursoj dum la 49-a U.K.

Dum la Universala Kongreso en Den Haag okazos 4 diversaj tuttagaj ekskursoj: al Amsterdam, al la monde konata fermdigo, al tipa nederlanda regiono — Zelando, al la imponaj kaj grandiozaj deltolaboroj. Lasta limdato por la mendo: la 10 julio. Post la komenciĝo de la Kongreso la prezoj de la ekskursoj plialtiĝos je 10%, se restos lokoj disponeblaj.

Telero el Delfta Bluo.

Ni atentigas, ke la belega telero el delfta bluo, speciale farita okaze de la 49-a U.K., ne estos aĉetebla dum la Kongreso, sed oni devas ĝin antaŭmendi. Detaloj kaj mendilo troviĝas en la Dua Bulteno de la Kongreso. Ne perdu la okazon havigi al vi altvaloran objekton.

Abonu la monde konatan bildrevuon

la Praktiko

"la gazeto, kiu instruas kaj amuzas"

— alloga aranĝo, ilustritaj artikoloj pri ĝeneralaj temoj, tre taŭga legaĵo por komencantoj kaj progresantoj. Abonigu viajn kursanojn!

Nun akurate aperanta ĉiumonate


Redaktas: S-ino E. Burgler-Jeszö

Eldonas UEA

Abonprezo 1964: 8,— gld. (32 st.) Pagojn akceptas la kutimaj perantoj de UEA kaj UL.

LA NAŬZO

bind.
14,10 gld.
56,40 st.



broŝ.
11,70 gld.
46,80 st.

222 p.
15 × 21

222 p.
15 × 21


la obseda romano de

Jean-Paul Sartre

intimaj pensoj de neordinara menso
la unua okcidenta verko en la serio

ORIENTO-OKCIDENTO

Tradukis Roger Bernard. Eldonis UEA.



Supre en la Aeroporto.....

.... en la flugtrafika kontrolturo - plej avant-aĝa punkto por rigardi kaj reguligi la senfinan vicon de venantaj kaj forflugantaj aviadiloj. Sed en mallumo, en nuboj malalte ŝvebantaj aŭ densa nebulo, oni fakte ne vidas multon, eĉ ne el la kontrolejo. Tamen, flugmaŝinoj alvenas kaj foriras laŭ hortabelo, tra la tuta jaro..... kaj tra ĉiuj 24 horoj de tago kaj nokto.

Aervojaĝado estas tiel esenca ke ĝi ne devas dependi de kapricoj de klimato aŭ horloĝo. Tiuj obstakloj DEVIS esti venkitaj: kaj Philips ludis

grandan rolon por forigi ilin. Eĉ kiam videbleco estas nulo, Philips-radaro gvidas la piloton hejmen.... La alteriga ekipaĵo de Philips kondukas lin al la surteriĝejo.... Radio-signaliloj kaj lumgvidiloj de Philips sekurigas lian surteran vojon.

Kiam vi, aŭ via familio, vojaĝas aviadile, Philips flugas kun vi la tutan tempon - por plisekurigi vian flugon kaj certigi bonan surteriĝon.

PHILIPS
Elektronika Ekipaĵo